

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №1



Fulmnovaĵo: Esperanto Subgrunde 2 finfine aperis!

## Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №1 (311)

**La Ondo de Esperanto** aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redakcio:**

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

**Retpoŝtaj adresoj:** sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

**Retejoj:** <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

**Abontarifo por 2022**

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

**Anonctarifo**

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2022, №1 (311).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 29 марта 2022 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	2
En ĉi tiu numero .....	3
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Redakcie .....	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Donacoj en 2021 .....	6
<b>Eventoj</b> .....	<b>7</b>
Lucas Rivière. La 40a Poludnica sukcese omaĝis sian fondinton .....	8
Irina Gonĉarova. Ni semas kaj semas... Esperanto en infana ripoztendaro .....	10
Irina Gonĉarova. APERo-15: 25 unuafojaj partoprenantoj .....	12
Povilas Jegorovas. Jam 181 aliĝintoj al BET-56 .....	14
Amri Wandel. Amri Wandel lekcios pri spacteleskopoj en BET-56 .....	15
Nijolė Žambaitė. Nijolė Žambaitė: Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj .....	17
Tuomo Grundström. Tuomo Grundström: Prezentiĝo kaj prezentoj .....	18
Saša Pilipović aktoros kaj kantos en Klajpedo .....	19
Povilas Jegorovas. Kunveno en la akademia biblioteko omaĝe al Ŝilas .....	20
Povilas Jegorovas. La Zamenhofa ekspozicio plu migras tra Litovio .....	21
La komitato aprobis la vendon de la Roterdama domo .....	21
Ilona Koutny. Poznano: Virtuala interlingvistika sesio .....	22
Elekto de triono de la Akademianoj .....	23
Irina Gonĉarova. Kvin jaroj de Esperanto-Poŝtkruciĝo .....	24
IJK 2023 okazos en Italio .....	24
Kvar komitatoj B de UEA estas elektitaj sen baloto .....	25
Informo de la Elekta Komisiono: elektoj en 2022 .....	25
Kanado kaj Kebekio mildigas KOVIM-rilatajn regulojn .....	26
Pri indiĝenaj lingvoj en Montrealo: Fettes reĝisoros la temon de la 107a UK .....	27
Aliĝu al la KER-ekzamena sesio de la 107a UK .....	28
La hispana kongreso – samloke post du jaroj .....	28
Lars Sözüer. BEMI: Sur du radoj .....	29
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Funebraj notoj .....	30
<b>Tribuno</b> .....	<b>32</b>
“Ni ne ĉesu labori por paco inter homoj kaj nacioj”: Alvoko de UEA .....	33
Pliaj reagoj pri la eventoj en Ukrainio .....	34
Aleksander Korĵenkov. Deklaro de kvin (eks)gvidantoj de REU: du versioj .....	35
Aleksandr Lebedev. Distanciĝo de la antaŭnelonga deklaro pri la eventoj en Ukrainio .....	36
Benoît Philippe. Responde al Lebedev .....	37
Stipendioj Marjorie Boulton .....	38
Ilona Koutny. Magistraj studoj pri interlingvistiko .....	39
Vortoj: UEA partneras en EU-projekto .....	40
Instruu Esperanton en Senegalio kun stipendio .....	41
Paulo S. Viana. <i>Sezonoj</i> : Eminentaga agado .....	42
Trompo-provoj per Esperanto: Estu atentaj .....	43

<b>Arkivo</b> .....	<b>44</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2022 .....	45
Rigardo malantaŭ la sanktulan bildon .....	47
Jarosław Parzyszek. La 50a naskiĝdato de PSEK (1972-1992) .....	48
<b>Kulturo</b> .....	<b>54</b>
Aleksander Korĵenkov. Nova serio: <i>Rusa Novelaro 2</i> .....	55
Ivan Bunin. En bieneto; Facila spirado; Sunfrapo; En Parizo; "Madrido" (Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov) .....	56
Ĵenja Amis. Kvar rakontoj (Vendredo, la 13-a; "Fromaĝo elmusiĝis"; Rafaelo; Trafiko haltas) .....	84
Paulo S. Viana. Florada .....	88
Aleksander Korĵenkov. Libroproduktado: kresko tro eta .....	91
Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> , 2021, N <sup>o</sup> 4: Rakontoj de migradoj .....	94
Miguel Fernández. Poezia kvodlibeto .....	95
Carlo Minnaja. Ne ĉiuj libroj kostas (Recenzo: Dostojevskij F. <i>Kvin rakontoj</i> ; Ĉeĥov A. <i>Malgranda trilogio</i> ) .....	102
Nia poŝta adreso .....	104
Zbigniew Kornicki. Dum tondras kanonoj... (Recenzo: Lem S. <i>Solaris</i> ) .....	105
Wolfgang Kirschstein. Ĉielarkkolora Esperantio (Recenzo: <i>Verda stelo kaj roza triangulo</i> ) .....	107
Literatura konkurso "Ĥristo Gorov – Ĥrima 2022" .....	108
Paŭlo Moĵajevo. Albumo mezgranda kaj mezinteresa (Recenzo: <i>MARta kaj JOmo kantas MAYOMA-n</i> ) .....	109
Johannes Genberg. Amo kaj perforto (Recenzo: EKDE TIAM. <i>Amo kaj Perforto</i> ) .....	110
Flo Martorell. <i>Veko</i> : La unua albumo en 2022 .....	111
Flo Martorell. <i>Esperanto Subgrunde</i> , Vol. 2: 49 kantoj en du diskoj .....	112
Flo Martorell. Grava inundo kaŭzis prokraston de novaj albumoj .....	113
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>Malgranda trilogio</i> de Ĉeĥov: Suplemento 2021 .....	114
Povilas Jegorovas. ESLI: nova Esperanta-litova vortaro .....	115
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> N <sup>o</sup> 42 (oktobro 2021) .....	116
<i>Literatura Foiro</i> , 2021, N <sup>o</sup> 214, 2022, N <sup>o</sup> 215 .....	117
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. 800 tagoj da informado en La Ondo .....	119
INK-2: La temo: Nokta vojaĝo .....	120
<b>Mozaiko</b> .....	<b>121</b>
Stanislav Belov. Armeaj ŝercoj .....	122
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj .....	123
Perantoj de La Ondo de Esperanto .....	124

**Kovropaĝe:** Dudek du jarojn post la unua kompilo "Esperanto Subgrunde" ĵus aperis la dua kompilo kun 49 muzikaĵoj. Rapidu mendi kaj aŭskulti!



La foto el la Somera Olimpiko en Tokio kun la Ruslanda ĉampionino Maria Lasitskienë (naskita kiel Maša Kučina) kaj la Ukrainia bronzmedala saltistino Jaroslava Mahučič, pasintomere trakuris la mondon kiel simbolo de amikeco interhoma spite al malamikeco interŝtata, sed Jaroslava estis skoldita pro ĝi en sia patrujo. Duonjaron poste, antaŭ la Vintra Olimpiko 2022 en Pekino al la Ukrainiaj sportistoj oni malpermesis fotiĝi kun ruslandanoj. Kaj antaŭ kvar tagoj la 16-jara Ukrainia figursketistino Anastasija Ŝabotova (naskita en Moskvo) estis forpelita el la Ukraina teamo mondĉampionata pro tio, ke ŝi kuraĝis “ŝati” en socia reto skribaĵon de Jevgenij Pluŝĉenko (tipe ukraina familinomo), duobla Olimpika ĉampiono el Ruslando.

Nun en kaj apud Ukrainio tondras eksplodoj, mortas armeanoj kaj civiluloj. Nun tie gravas ne homaj ecoj, sed la aparteno nacia kaj ŝtata. Ni – Aleksander, kies patro devenas el la Brjanska regiono, kie neniu scias certe, ĉu oni estas ruso, ukraino aŭ belaruso, kaj Halina, filino de ukraina patro kaj pola patrino – ne vidas la malsaman naciecon aŭ ŝtatanecon preteksto por malpaco, kaj ni ne simpatias kun “patriotoj”, pretaj ataki ĉiujn, kiuj parolas alilingve aŭ loĝas alilande.

Saĝulo diris, ke malbona paco estas pli bona ol bona milito. Ni povas nur ripeti tion. Ni esperas, ke ni denove vidos fotojn de kunaj sportistoj kaj simplaj homoj Ruslandaj kaj Ukrainiaj. Malgraŭ averto pri evitado de nekorekta uzado de la vorto “milito”, ni senhezite diras: ni estas kontraŭ milito kaj naciismo, ni estas por paco. Ni kredas, ke ankaŭ, vi, niaj legantoj, samidee estas pacaj batalantoj.

**Halina kaj Aleksander**

# Donacoj en 2021

Nia gazeto kaj nia ĉiutage aktualigata novaĵretejo ricevas neniun financon helpon de esperantistaj asocioj kaj fondaĵoj, ili ekzistas nur danke al la donacoj kaj abonon al la gazeto *La Ondo de Esperanto*. En la abonjaro 2021 ni ricevis donacojn de tri patronoj kaj 27 amikoj (en 2020 estis kvar patronoj kaj 18 amikoj).

## **Patronoj (100 eŭroj)**

Teamo INK (Italio)  
Syôzi Nobuyuki (Japanio)  
Aleksej Garkovenko (Ruslando)

## **Amikoj (30 eŭroj)**


Claude Glady (Belgio)  
Malcolm Jones (Britio)  
John Murray (Britio)  
Lydia Lindla (Estonio)  
Osmo Buller (Finnlando)  
Tuomo Grundström (Finnlando)  
Jean Bizet (Francio)  
Marielle Martin (Francio)  
Reinhard Fössmeier (Germanio)  
Ingrid Gleitsmann (Germanio)  
Klaus Leith (Germanio)  
Werner Pfennig (Germanio)  
Carlos Spinola (Hispanio)  
Pedro Zurita (Hispanio)  
Carlo Minnaja (Italio)  
Sara Spanò (Italio)  
Geoffrey Greatrex (Kanado)  
Richard Piper (Kanado)  
Gražina Opulskienė (Litovio)  
István Ertl (Luksemburgio)  
Marc van Oostendorp (Nederlando)  
Leon Roijen (Nederlando)  
Bård Hekland (Norvegio)  
Ilona Koutny (Pollando)  
Bo Sandelin (Svedio)  
Stefan Brodd (Svedio)  
Jean-Marc Lugin (Svislando)

*Koran dankon al ĉiuj subtenantoj!*

Se vi deziras, ke niaj almanako kaj retejo daŭre funkcii kaj pliboniĝu, iĝu abonanto (15 eŭroj), amiko (30 eŭroj) aŭ patrono (100 eŭroj) de *La Ondo de Esperanto*. Pri la pagomanieroj legu ĉe <https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

**Halina Gorecka**  
**Aleksander Korĵenkov**

# *Eventoj*



Post la du sinsekvaj jaroj, dum kiuj mankis la “kongresa sezono” en Esperantujo, ĉi-jare oni verŝajne povos ne virtuale, sed reale kongresumi. En la 26a paĝo vi povas legi, ke Kanado kaj Kebekio mildigas la kontraŭpandemiajn regulojn.

**Bonvenon al Montrealo!**

Foto: Jiaqian AirplaneFan – [https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Building\\_with\\_its\\_pointed\\_roof\\_-\\_panoramio.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Building_with_its_pointed_roof_-_panoramio.jpg)

## La 40a Poludnica sukcese omaĝis sian fondinton

De la 6a ĝis la 9a de januaro 2022 renkontiĝis en la civito Liptovský Ján en Slovakio grupo de esperantistoj por la tradicia ĉiujara renkontiĝo *Poludnica*, kiu eble estis la unua internacia Esperanto-renkontiĝo de la jaro 2022 tutmonde. Sed ĉi-jare la renkontiĝo estis iom speciala, ĉar ĝi estis dediĉita al la memoro de Ján Vajs (1953–2021) – fondinto de la aranĝo, kiu subite forpasis aŭtune 2021 pro koratako.

Sed eble kelkaj el vi dirus: “Sed kiu estis tiu Ján Vajs kaj kio estas la Poludnica renkontiĝo?” Pri Ján Vajs, unu gazeto, dediĉita nur al liaj vivo kaj laboro, estus bezonata, por ke vi pli bone sciu pri li! Dank’ al la heroa laboro de kelkaj homoj, tion vi povas fari, legante la eksterordinaran numeron de *Esperantisto Slovaka*, kiu rakontas ĝuste pri unu el la plej influaj personoj de la Slovaka Esperanto-movado.

Kaj pri la evento mem, por repreni la vortojn de Vladimír Škuta (kiu parolis pri ĝa historio en la menciita eldono de *Esperantisto Slovaka*): la historio de la Poludnica evento komenciĝas en 1983. Fondita de Ján Vajs, komence la evento estis unutaga renkontiĝo, kiu celis ekskurson al la Poludnica montopinto por malgranda grupo de esperantistoj kaj Esperanto-simpatiantoj. Paŝon post paŝon, la grupo komencis kreski kaj estis ne nur lokaj esperantistoj, sed esperantistoj de la tuta Slovakio kaj eĉ el la tuta mondo. Kaj kun tio, la evento ankaŭ ŝanĝiĝis de unutaga al la semajnfina kaj iĝis “renkontiĝo de Esperanto-vojaĝantoj kaj turistoj”.

Antaŭe Ján Vajs kaj la Liptova Esperanta Klubo (LEK) organizis ĉi tiun eventon, sed ĉi-jare Peter Baláž nome de SKEF anstataŭis lin. Transprenante la zorgon, li ebligis al tiu evento ekzisti ankoraŭ unu jaron pli, kaj espereble ne la lastan!





Ĉi-jara programo estis sufiĉe plena de mult-tipaj eventoj kiel spektado de filmoj, realigataj de la sperta Peter Rybín (vi povas trovi plurajn el liaj videoj ĉe <https://www.youtube.com/user/LEKSK/videos>), prelegoj (pri vojaĝoj kaj ekskursoj, sed ne nur), ekskursoj (al la varma fonto Kaĉa, al la kaverno Stanišovská jaskyňa ...), kantigaj atelieroj kun gitaro; kompreneble la supreniro al Poludnica kaj iom da libera tempo por lasi la partoprenantojn proponi mallongajn kontribuojn memore al Ján Vajs. Se vi ŝatus vidi detale la programon, vi povas trovi ĝin ĉe <https://poludnica.esperanto.sk>.

Tamen ni notu ĉi-jare la ĉeeston al la supreniro de 36 homoj (kontraŭ 16 lastjare) el tuta Slovakio kaj de 4 aliaj landoj: Ruslando, Pollando, Francio kaj Usono. Inter la ĉeestantoj estis kvar E@I-teamanoj: Dorota, Petro, Daria kaj mi – Lucas.

Ankaŭ la kutimo porti ŝtonojn al la Esperanto-obo dum la supreniro de Poludnica estis respektita! Tiu simbola ago, devenanta de Mongolio kaj adoptita de Ján Vajs, celas lasi ŝtonojn de diversaj pezoj, grandecoj kaj originoj en unu loko omaĝe al io aŭ iu. Ján ankoraŭ havis stokon da ŝtonoj ĉe si, kiun li planis kunporti, do ĉi-jare ili estis ĉiuj finkunportitaj al la Esperanto-obo omaĝe al li pere de kelkaj liaj amikoj.

Ni certas, ke Jan fierus vidante ĉi-jaran eventon... Sed eble li eĉ vidis de la loko, kie li nun estas? Kiel menciis unu de liaj amikoj de la Stanišovská kaverno dum la ekskurso, ili metis kandelon al la enirejo de unu kaverno kiun Ján malkovris kaj multe zorgis pri ĝi, kaj post kelkaj minutoj tiu vitra kandelujo “eksplodis”!

Ĝis la revido, eble sekvan jaron en la tatraj montoj!

**Lucas Rivière**

franca volontulo en E@I



## Ni semas kaj semas... Esperanto en infana ripoztendaro

La Nova Esperanta jaro 2022a startis por mi la 1an de januaro kune kun la trajno “Moskvo-Ĉeboksaro”. Ĝi portis min kaj mian 16-jaran samklubanon Romĉjo Ralko al la infana ripoztendaro, tradicie organizata dum lernejaj ferioj de la Ĉeboksara instruejo “Lingvo por sukceso”.

La sekvan matenon nin renkontis ĉe la kajo Aleksandr Blinov – la direktoro de la instruejo kaj de la vintra tendaro. Post kelka tempo nin jam salutis aliaj infangvidantoj. Ili ĉiuj estis miaj bonaj konatoj: kelkaj gejunuloj kiel kolegoj en la pasintjara somera tendaro, kaj la aliaj kiel esperantistoj.

La gvidteamo estis unika. Unuflanke, ĉar pro evidentaj kialoj la teamon ne povis kompletigi eksterlandanoj, kies partopreno estas alloga specialaĵo de tiuj tendaroj. Aliflanke, ĝin konsistigis bone parolantaj esperantistoj: dum la jubilea 25a Ĉeboksara lingva festivalo, pasinta oktobre 2021, pri partopreno ekinteresiĝis Darja Zenelina (Sankt-Peterburgo), Martin Bureš (ĉeĥo, laboranta nun en la apudmoskva Dubna), Romĉjo Ralko, Jaroslavna (Slava) Puškarskaja (Dimitrovgrad), lernanta Esperanton ekde majo 2021. Bonŝance, ili ĉiuj sukcesis veni (Martin nur por du lastaj tagoj). Tiel en la 11-kapa teamo estis sep lernejanoj kaj ses esperantistoj.





Tio ne povis ne influi al la etoso de la tuta aranĝo: sur la anorakoj de la tendaranoj aperis la frazo en Esperanto “La limoj de nia lingvo signifas la limojn de mia mondo”, parolado en Esperanto sonis inter la teamanoj, ĉe manĝotabloj kaj dum la matenaj kaj tagfermaj kunvenoj, sed ĉefe – triono el la partoprenantaj geknaboj eklernis Esperanton kiel la duan lingvon.

La tendaro estas lingva, tial ĝia tagordo antaŭvidas nepran ĉiutagan lecionon de la angla kaj unu ĉiutagan lecionon de elektebla lingvo (la germana, franca, korea, belorusa kaj Esperanto). En la unua tago infanoj po dek homoj venas al la lingva instruonto, kiu dum dek minutoj rakontas al ili pri la proponata lingvo kaj sia kvinhora kurseto. Ricevinte informojn pri la proponataj

lingvoj, la lernantoj enskribiĝas en la liston de la koncerna lingvogrupo. Se en la listo jam estas 10 homoj, necesas aliĝi al alia grupo. Tiel funkcias kutime, sed ne nun. Post iom da konfuzoj la teamo decidis ne limigi la kvanton da lernantoj en la Esperanta grupo. Tial la kurseton vizitadis 19 diversaĝaj kaj diverskapablaj, sed diligentaj kaj entuziasmaj Esperanto-lernantoj.

Ni decidis ne dividi la grupon, kaj en la instruado multe helpis la teamanoj Darja kaj Slava. La lecionoj flugis fulme... Mia celo estis instrui la geknabojn uzi la 20-paĝan varb-broŝuron, kiun mi donacis al ĉiuj en la unua leciono. La varbilo enhavas skizon de Esperanta gramatiko, bazan vortaron kaj kelkajn tekstojn. Tre supraĝe ni sukcesis tuŝi ĉion, ludante, kantante, ĥore prononcante langrompilojn kaj konstruante demandojn al poeziaj tekstoj.

Ni sukcesis fari koncerteton okaze de la naskiĝtago de Darja Zelenina kaj verki novjaran gratulkarton al Aleksandr Blinov. Foje ni apartigis 7-8-jarulojn, tiam kun ili laboris Slava. Ekzemple, ili devis grupigi 50 bildkartetojn kun Esperantvortaj surskriboj laŭ la temoj, ĉiu infano parkerigis elektitan vortliston kaj poste diktis ĝin al la tuta lernogrupo. La etuloj tiel serioze traktis siajn taskojn, ke ili faris eĉ pli, ol ni petis. Ankaŭ pli aĝaj infanoj laboris sindone. Estis granda ĝuo vidi geknabojn legantajn Esperantan varbilon ekster niaj lecionoj aŭ ricevi de iu tradukon de versaĝo – malgraŭ tio, ke ni ne havis hejmajn taskojn.

La plej kortuŝaj momentoj estis kiam post la septaga tendarumado, dum la fina kunveno, kie ĉiu infano povis esprimi impresojn pri siaj travivaĵoj, kelkaj konfesis, ke ili deziras daŭrigi la lernadon de Esperanto. Unu knabo skribis al mi (ruse): “Mirina, dankon pro la bonegaj lecionoj de Esperanto. La amo al tiu ĉi lingvo brulas en mi”.

Ni ĉiuj adiaŭis kun arda kredo pri la nova renkontiĝo somere. Eble, tiam ni daŭrigos...

**Irina Gonĉarova**

## APERo-15: 25 unuafojaj partoprenantoj

Ajna paŭzo minacas al tradicioj. Feliĉe, la 15a APERo, ne okazinta en 2021 pro la pandemio, okazis apud Moskvo la 23-27an de februaro. Spite al la koronavirusa timo ĝi ne estis denove prokrastita kaj ne estis replanita por la martaj festotagoj. Ŝokitaj pro la novaĵoj el Ukrainio, la organizantoj ne trovis decidemon nuligi la renkontiĝon dum ĝia dua tago.

La renkontiĝo evoluis kutimmaniere kaj rezultis vere bona. Eĉ pli: eble, tiu ĉi APERo estis la plej sukcesa el ĉiuj antaŭaj. Por tiu aserto ekzistas ankaŭ objektivaj pruvoj: la renkontiĝo certe estis la plej multnombra (50 homoj el 16 urboj); la programo enhavis signifan kvanton da tute novtipaj aranĝoj; duono da partoprenantoj (novuloj kaj konataj esperantistoj) antaŭe neniam partoprenis APERojn; aktive envolviĝis en la aferojn 12 gejunuloj 14-27 jaraĵ.

La temo de tiu ĉi APERo estis "Tradicioj". Ĝi oficiale komenciĝis la 23an de februaro je la 20a horo per la malfermo. Estis tradiciaj eroj (simbola "hisado" de la flago, kantado de la APERo-himnoj, teamaj prezentaĵoj k. s.) kaj iom da tradiciaĵoj el la Sovetia junulara esperantista movado, ekzemple, salutado de la gastantaj urboj: samaranoj deklamis kaj kantis, ĉeboksaranoj prezentis interesajn faktojn pri sia urbo, jekaterinburgaj Strigo kaj Erinaco nin gajigis per amuza dialogo, salutataj de dimitrovgradanoj ni spektis ĵongladon ĉe ritma gitarmuziko, iom da interesaj faktoj ni eksciis pri Novoĉerkasko, per videoprezentaĵo kaj moderna kantado rivelis sian aperon niĵnij-novgorodanoj. Estis minuto de silento memore al Anatolo Gonĉarov kaj aliaj esperantistoj, forpasintaj dum la du pandemiaj jaroj.



La tri sekvaj tagoj kaj duono de la lasta estis plenaj je varia kaj aktive vizitata programo, kiu realigis ĉiujn planitajn erojn. Grandan intereson vekis ĉiuj prelegoj, ekde “Enkonduko en la krokodilologion” de la akademiano Nikolaj Gudskov (Moskvo) ĝis “Tataraj kaj ĉuvaŝaj tradicioj” de studentinoj-komencantinoj Anna Pogorelaja kaj Lilia Galkina (Ĉeboksari). Brile prezentis sin mem kaj sian temon “Udegoj: vivo kaj tradicioj de arbaraj homoj” la novulo Viktoro Lagutin. Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) organizis poezian horon “Ĉiuj vintraj vojoj kondukas al printempo” kaj prizorgis belan festenon okaze de la 27-jariĝo de MEA MASI. Kiel ĉiam, multe riĉigis la renkontiĝon Mikaelo Povorin, kiu aranĝis la interpretistan konkurson, rebus-divenadon, deĉifradon de konataj kantotekstoj kaj koncerton.

Perfekte pasis la novaj majstro-klasoj pri pentrado kaj farado de pajlaj ĉevaletoj fare de la unuafojaj gastinoj Julija Blinova (Ĉeboksari) kaj Jana Kozlova (Niŝnij Novgorod). Al Petro Fedosov (Moskvo) ni danku pro la tema diven-ludo “Kio? Kie? Kiam?” kaj al Darja Zelenina (Sankt-Peterburgo) pro la profesie organizitaj intelektaĵoj “Debatoj” kaj “UN-ludo”. Paralele kun programeroj por bonparolantoj okazis programo por novuloj. Ilian atenton altiris gajaj paroligaj lecionoj de Aleksandr Blinov (Ĉeboksari) kaj lernado de kantoj kun Mikaelo Povorin kaj Aleksandr Ĥrustaljov (Dimitrovgrad). Agrablas noti, ke inter la unuafojaj partoprenantoj surprize troviĝis kelkaj bonegaj kantistoj. Krone, certe, okazis noktaj “Homlupoj”.



Ŝajne, tiu ĉi APERo estis tiom sukcesa ĝuste pro novaj homoj – junaj, talentaj, scivolemaj kaj parolemaj Esperante. Ili disiĝis kun bedaŭro kaj disveturis kun la revoj pri la novaj renkontiĝoj. Novaj renkontiĝoj, geamikoj! Ĉu la destino permesos al ni tiun lukson?..

Ĉi tie konvenus meti punkton. Sed – ne. Ni nepre danke menciu la organizan kernon – Aleksandr Basov (Moskvo) kaj Darja Zelenina. Tamen indegas emfazi, ke APERo ĉiam estis kaj restos kunlaboro de ĉiuj partoprenantoj. La enhavon de la programo, la firman lingvan disciplinon, la etoson tenas la alvenantoj. Tial – dankegon al ĉiuj!

**Irina Gonĉarova,**  
iniciatinto de APERo

**Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!**

## Jam 181 aliĝintoj al BET-56



Je la 27a de marto 2022 jam 181 personoj el 25 landoj aliĝis al la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56). Nature, la plej multaj aliĝoj estas el Litovio – entute 81. Tiu kvanto kreskos. Jen estas la laŭlanda aliĝtabelo:

Litovio – 81 personoj

Pollando – 19 personoj

Latvio – 13 personoj

Germanio – 11 personoj

Ruslando – 10 personoj

Pakistano – 7 personoj

Ukrainio – 6 personoj

Estonio, Hungario – po 5 personoj

Francio – 4 personoj

Finnlando – 3 personoj

Israelo, Italio, Serbio, Svedio – po 2 personoj

Aŭstralio, Aŭstrio, Belorusio, Hispanio, Kubo, Malio, Nederlando, Portugalio, Slovakio, Svislando – po 1 persono

Entute – 181 personoj el 25 landoj.

Sendube, la pandemio esence influas al la aliĝado. Tamen nun la pandemio jam iras al la fino kaj ne plu povas esti kaŭzo por ne veni al BET-56. Restas ankoraŭ tri monatoj ĝis la komenco de BET-56, kaj dum tiu tempo la organizantoj atendas konsiderindan kvanton da novaj aliĝintoj.

Ni akceptos la aliĝojn ĝis la lasta momento. La kvanto da partoprenantoj ne estas limigita. Substrekindas ankaŭ tio, ke nun al Litovio senkontrole kaj libere povas veni ankaŭ nevakcinitaj homoj el la landoj de Eŭropa Unio kaj el Svislando, Norvegio, Britio, Islando kaj kelkaj aliaj. El ĉiuj aliaj landoj rajtas veni homoj vakcinitaj per vakcinoj agnoskitaj de Eŭropa Unio aŭ de Monda Organizo pri Sano, homoj jam malsanintaj je Covid-19, aŭ testitaj maksimume 72 horojn antaŭ la eniro en Litovion kun negativa rezulto. En Litovio ĉiuj pandemiaj limigoj jam estas forigitaj.

La Organiza Komitato konsideras tion kaj prepariĝas plenumi ĉiujn sekurigajn sanpostulojn dum la aranĝo. En la Organiza Komitato estas speciala kuracisto, kies devo estas zorgi pri medicinaj kaj sanprotektaj aferoj.

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

## Aleksej Birjulin forpasis

La 13an de januaro 2022 en Tomsko forpasis


**Aleksej Petroviĉ Birjulin (Бирюлин, 1956-2022),**

Siberia inĝeniero kaj elstara Sovetunia kaj Ruslanda esperantisto, kunfondinto kaj komitatano de E. R. Kulturo (1984-91), komitatano de Ruslanda Esperanto-Asocio (1992-94), kunfondinto kaj redakciano de la legenda almanako *Sezonoj* (1984-90), kunlaboranto de *Ekzakte* kaj *La Ondo de Esperanto*, redaktoro de *Spektro* (1993-94), aŭtoro de pluraj artikoloj, recenzoj (precipe de verkoj scienc-fikciaj, fantastaj kaj muzikaj), tradukoj kaj studoj, inkluzive de la samizdate eldonita broŝuro *Pri la nocio "esperantisto-aktivulo" aŭ la aktivecoj veraj kaj malveraj* (1984), membro de la juĝkomisiono de la konkurso *Liro*, bonega konanto de literaturo kaj muziko, kreinto de pluraj popularaj Esperantaj esprimoj...

Lastatempe Aleksej Birjulin kunlaboris en nia reta projekto pri kolektado, sistemigo kaj publikigo de materialo pri Sovetunia Esperanto-movado en la 1970-80aj jaroj.

*Ni funebras pro la forpaso de nia proksima amiko Aleksej (kaj baptofilo de Aleksander) kaj kondolencas al lia edzino Raŝida, kaj al liaj infanoj kaj nepoj.*

**Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Aleksej Korĵenkov**



## Simo Milojeviĉ forpasis

La 3an de februaro 2022 en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino) forpasis

**Simo Milojeviĉ (1936-2022),**

serba kulturaganto, ĵurnalisto kaj esperantisto, loĝinta en Nederlando ekde 1969 ĝis 2007; unu el la plej gravaj movadorganizantoj en la lasta triono de la 20a jarcento, sekretario de Jugoslavia Esperanto-Ligo (1964-69), komisiito de UEA pri instruado de Esperanto en Hinda Unio kaj Nepalo (1960-61), oficisto en la Centra Oficejo de UEA (CO, 1974-2002), interalie, kiel vicdirektoro de CO (1974-80) kaj ĝenerala direktoro de UEA (1983-95); redaktoro de *Jugoslavia Esperantisto* (1963), *La Suda Stelo* (1964, 1967-69), *Kontakto* (1970-74) kaj *Esperanto* (1974-84), aŭtoro de multaj artikoloj, redaktinto de pluraj libroj eldonitaj de UEA; membro de la Akademio de Esperanto (1989-98); laŭreato de la premio Deguĉi (2006), honora membro de UEA (2008).

*Ni funebras pro la forpaso de Simo, kies helpoj kaj gastamon ni ĝuis, kaj kondolencas al liaj parencoj kaj proksimuloj.*

**Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov**



# Ni funebras kaj kondolencas

La 11an de februaro 2022 en Brjansk (Ruslando) pro la koronaviruso forpasis

**Anatolij Jevgenjeviĉ "Anatolo" Gonĉarov (Гончаров, 1940-2022),**

Sovetunia kaj Ruslanda kemiisto kaj esperantisto (ekde 1958), instruanto de Esperanto kaj movadorganizanto, fondinto kaj gvidanto de kelkaj Esperanto-kluboj, kunfondinto kaj prezidanto (1966-69, 1972-74) de SEJM, estrarano (1979-89) kaj vicprezidanto (1988-89) de ASE kaj gvidanto de ties scienc-teknika komisiono, vicprezidanto de SEU (1989-90), senatano de la Esperanta Civito (2002-11); aŭtoro de pluraj artikoloj aperintaj en Esperantaj gazetoj, kompilinto de *Esperanto-identeco: citaĵoj kaj komentoj* (2010) kaj *Tiu ĉumalofta sufikso -um* (bitlibro, 2021), kuntradukinto de la libro *Defendi la pacon, preventi nuklean militon: Proponoj de Soveta Unio en la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado* (1982).

La 25an de februaro 2022 forpasis

**Claude Nourmont (1945-2022),**

franca instruistino kaj esperantistino, dum pli ol 40 jaroj loĝinta en Luksemburgio, ekde sia junaĝo diversmaniere aktiva en la movado; estrarano de STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) kies kongreson en 1968 ŝi kunorganizis, prezidanto de TEJO (1975-77), prezidanto de UFE (1994-2001), vicprezidanto de UEA (2004-13), prezidanto de LKK de la 83a UK (Montpeliero, 1998), ĉefredaktoro de *Le Monde de l'Espéranto* (2003-22), redaktoro de *Monato* pri la arta rubriko (2005-22) k. m. a.

Malgraŭ sia enorma okupateco Claude dum pluraj jaroj kontribuis por *La Ondo de Esperanto* per siaj artikoloj kaj regule abonis kaj legis *La Ondon*.

La 25an de februaro 2022 post longa malsano en Novosibirsko forpasis

**Jekaterina Aleksandrovna Arbekova (Арбекова, 1969-2022).**

Ŝi lernis Esperanton en 1989 kaj enmovadiĝis en la Klubo de Internacia Amikeco ĉe la uzino "Serp i Molot" (Moskvo). Antaŭ tri jardekoj Katerina ekloĝis en Novosibirsko, kie ŝi instruis la anglan kaj Esperanton, laste en la junulara centro "Zodiak". Ŝi gvidis la Novosibirskan Esperanto-klubon, multe vojaĝis, iniciatis kaj organizis en Siberio kelkajn novjarfestajn renkontiĝojn "Novojarsk" kaj 15 "Renkontiĝojn de Amikoj" (RA).

Pasintjare Katerina Arbekova vizitis Kaliningradon kaj decidis okazigi tie la 16an RA, sed unu semajnon antaŭ sia morto ŝi skribis, ke ŝi ne sukcesis resaniĝi kaj do devas nuligi RA-16.

*Ni funebras kaj kondolencas al la parencoj kaj proksimuloj de la forpasintoj, kiujn ni bone konis.*

**Halina Gorecka, Aleksander Korjenkov**



# *Tribuno*



**UEA, ILEI, TEJO, SAT, Civito kaj aliaj esperantistaj asocioj ne ignoris la lastatempajn eventojn en Ukrainio, sed eble la plej interesa estis la deklaro de kvin (eks)gvidantoj de la eta Ruslanda asocio REU, kies prezidanto distanciĝis de ĉi tiu deklaro. Legu priajn tekstojn (kaj sekvu la retligojn) en la sekvaj paĝoj de “Tribuno”.**

# **“Ni ne ĉesu labori por paco inter homoj kaj nacioj”:** **Alvoko de UEA al la esperantistoj kaj la mondo**



Reage al la militaj tondroj kaj homa sufero en la oriento de Eŭropo UEA deklaras:

En la historio de la homaro homoj strebis al la idealo de paco, sed neniam sufiĉe por certigi ĝian finan atingon. Tamen precize nun niaj modernaj komunikiloj havas la potencon unuigi la tutan mondon por individue kaj kolektive kriptesti uzadon de perforto kontraŭ senkulpaj kunhomoj, niaj gefratoj. La me-

memoro en kaj ekster Eŭropo pri du teruraj mondmilitoj kun milionoj da mortintoj bilde kaj vorte transdoniĝis kaj gravuriĝis en la konscio de ĉiuj nunaj generacioj.

Kian respondecon ni havas kiel esperantistoj, kiam eksplodas nova konflikto? La iniciatinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof, konsciis kaj mem spertis la kondiĉojn, kiuj kaŭzas militadon. Li kunligis siajn pacajn idealojn kun lingvo, kiu ebligas respektaman egalecon en la komunikado cele al reciproka interkompreniĝo inter la homoj. Vera bazo por tiu maturiĝo, kiu kondukus al definitiva forlaso de la deziro superregi aŭ suferigi niajn planedajn kunloĝantojn. En 1906, okaze de la 2a Universala Kongreso de Esperanto, en Ĝenevo, li deklaris: “Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam”.

Nia tasko estas klara. Komenci en nia propra konscio elradikigi antaŭjuĝojn kaj malamon al konatoj kaj nekonatoj. Poste kunlabori kun ĉiuj bonkoraj individuoj, kiuj dediĉas sin al edukado por interhoma kompreniĝo. Ni jam akceptis tiun sindevontigon, lerninte Esperanton. Sekve ni ne laciĝu insisti, ke niaj registaroj reprezentu la pacemajn dezirojn de siaj popoloj vivi en senkonflikta harmonio laŭ modeloj de la plej altaj etikaj principoj ekzempligitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Ni insistu, ke la membroj de Unuiĝintaj Nacioj devigu respekton al tiu Deklaracio, al la Ĉarto de UN kaj al ĝiaj fondaj principoj, kiuj naskiĝis de la deziro, ke neniam ripetiĝu la hororoj de amasmilitado.

Ni levu niajn voĉojn individue kaj kolektive kiel anoj de internacia movado, kiu ĉiutage laboras por paca interkompreniĝo. Per tiu potenco ni konsciigu al niaj registaroj, ke necesas plenumi la promesojn faritajn al la mondpopolo: solvi konfliktojn antaŭ ol ili erupcias katastrofe por ĉiuj mondloĝantoj.

UEA ne prenas politikajn poziciojn, krom pledi por la justeco de egalrajtiga internacia komunikilo, kiu faciligos la atingojn de pacaj idealoj kaj amon inter la popoloj. Ni tamen nature kaj senlace esprimas nian solidarecon kun ĉiuj samideanoj, kiuj suferas pro perfortaj atencoj kontraŭ iliaj rajtoj al paca, sekura vivo. Ni jam nun atentis, kiel ni povas helpi en la nuna situacio. La konto Espero ĉe UEA (<https://uea.org/alighoj/donacoj/espero>) estis fondita okaze de alia kruela milito

en Eŭropo por interalie iom helpi al familioj de esperantistaj viktimoj, kaj ni uzos tiun kaj aliajn rimedojn por montri nian solidarecon kun niaj kuraĝaj familianoj (tiu konto estas ĉiam malfermita por tiucelaj kontribuoj). La fondinto de UEA, Hector Hodler, celis krei kunlaboran reton de samideanoj tra la tuta mondo. Ni memoru la modelan laboron de nia Ĝeneva oficejo por kontaktigo de familianoj en alia kriza milito kaj montru, ke ni kapablas tuj agi por doni la praktikan helpon, kiun bezonas membroj de nia tutmonda familio.

Aliĝas al tiu deklaro la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

**GK UEA**

## **Pliaj reagoj pri la eventoj en Ukrainio**

Al la deklaro de UEA/ILEI pri la eventoj en Ukrainio lastatempe aldoniĝis tri pliaj. Krome, UEA kaj TEJO fondis helpo-servon.

Deklaracio de la Estraro de IJEA <https://mallonge.net/mk>

Deklaro de la Plenumkomitato de SAT <https://mallonge.net/ml>

Deklaro de TEJO <https://mallonge.net/mm>

Gazetara komuniko pri helpo-servo de UEA kaj TEJO <https://uea.org/gk/1026a1>

Intertempe la redakcio de *Libera Folio*, kiu publikigis la kvinopan deklaron de (eks)gvidantoj de REU, informis ke: “eksciinte ke iu el la subskribintoj jam ricevis konkretan minacon, ni decidis laŭ peto de iuj subskribintoj malpublikigi la kontraŭmilitan deklaron”.

## **Deklaro de Esperanto-Ligo en Israelo**

“Laŭ sia heredo, kaj historie kaj kulture, Israelo estas forte ligita kaj al Ukrainio kaj al Rusio. Multaj Israelanoj, kiel novaj kaj malnovaj enmigrintoj, havas familianojn en ambaŭ landoj. Tial la tre bedaŭrinda milito en Ukrainio tuŝas kaj malfeliĉigas multajn el ni persone”, – per ĉi tiuj vortoj komenciĝas la deklaro de Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) pri la situacio en Ukrainio.

Legu la deklaron en la retejo de ELI <https://www.esperanto.org.il/ukrainio22.html>

## **Unuanima rezolucio de la Esperanta Civito**

La Senato de la Esperanta Civito unuanime decidis a) daŭre partopreni en la streboj reformi Unuiĝintajn Naciojn, por ke la institucio ne estu nur sindikato de naciŝtatoj, kun privilegia statuso por kelkaj potencoj kaj nenioma agnosko pri la rajtoj de la popoloj sen naciŝtato, unuavice la diasporaj kaj la minorigitaj; b) firme malaprobi la konduton de la rusa registaro kaj esprimi solidarecon al la viktimoj en Ukrainio kaj al la disidentoj en Rusio; c) intense subtenadi ĉe la esperanta popolo la idealojn de reala demokratio, paca konekzistado, interpopola dialogo, kies pioniroj estis Pierre Cérésoule kaj Edmond Privat.

Legu la tutan tekston en HeKo: <https://www.esperantio.net/index.php?id=4491>

## **Deklaro de kvin (eks)gvidantoj de REU: du versioj**

La 27an de februaro kvin (eks)gvidantoj de REU, inter kiuj tri eksprezidantoj, estrarano kaj eksestrarano de REU (aliĝinta al UEA landa asocio por Ruslando) aperigis en *Libera Folio* deklaron kun la titolo “Rusiaj esperantistoj kontraŭ la milito”. Post unu tago ĉi tiu teksto estis grave ŝanĝita, ekzemple la frazo “La agreso de la rusia registaro estas nepermesbla kaj ne ĉiuj esperantistoj el Rusio subtenas ĝin” estis anstataŭigita per “La eventoj kiuj okazas en Ukrainio estas vere teruraj kaj ni deklaras ke ni estas kontraŭ tiu milito”. El la kvar “esperoj” de l’ subskribintoj restis nur unu, kun kiu povas konsenti ĉiu prudenta homo, nome: “Ni esperas, ke la milito plej baldaŭ finiĝos”.

Estas forigitaj la tri ceteraj “esperoj”:

– “Ni esperas, ke plejmulto de tiuj estas kontraŭ la milito, malgraŭ unuopaj eldiroj favore al ĝi”,

– “Ni esperas, ke Ukrainio, ties loĝantaro kaj interalie geesperantistoj postvivos ĝin”,

– “Ni esperas, ke ukrainiaj esperantistoj ankaŭ estonte havos bonajn rilatojn kun rusiaj samideanoj”.

Anstataŭ ili estas aldonita unu plia, kiu iĝis la dua:

– “Ni esperas, ke la esperantistoj samkiel la popoloj de niaj landoj retrovos vojojn al paco kaj amikeco plej rapide”.

La deklaro de la kvinopo restis preskaŭ neatentita en LF: nur du legantoj lasis siajn komentojn. Sed post la anonco pri ĉi tiu deklaro en la grupo <https://vk.com/priesperanto> en la socia reto “Vkontakte”, legita jam pli ol 700-foje, aperis 23 komentoj de Ruslandaj esperantistoj, plejparte kritikaj, poste forigitaj de unu el la administrantoj de ĉi tiu grupo.

### **La definitiva teksto de la deklaro estas jena:**

En ĉi tiu teruriga tempo ni, nunaj kaj eksaj aktivuloj de E-movado en Rusio kaj estraranoj de la Rusia Esperantista Unio, sendas nian plej sinceran kunsenton kaj plej bonajn dezirojn al la ukrainiaj samideanoj. La eventoj kiuj okazas en Ukrainio estas vere teruraj kaj ni deklaras ke ni estas kontraŭ tiu milito.

Ni esperas, ke la milito plej baldaŭ finiĝos.

Ni esperas, ke la esperantistoj samkiel la popoloj de niaj landoj retrovos vojojn al paco kaj amikeco plej rapide.

Milito ne estas solvo. Milito estas kontraŭhoma. Milito estas kontraŭ la ideo de Esperanto kaj esperantismo.

(alfabetorde)

**Iĝu patrono de “La Ondo de Esperanto”!**

**Grigorii Arosev** eksprezidanto de REU  
**Aleksandr Blinov** eksa ĝenerala sekretario de TEJO kaj eksa estrarano de REU  
**Irina Gonĉarova** estrarano de REU, prezidanto de la E-Asocio MASI  
**Nikolao Gudskov** eksprezidanto de REU  
**Georgij Kokolija** eksprezidanto de REU

La teksto de la deklaro estis iom redaktita kun la aprobo de ĉiuj subskribintoj jam post ĝia publikigo.

Fonto: <https://www.liberafolio.org/2022/02/27/rusaj-esperantistoj-kontrau-la-milito>

### **La origina teksto estas jena:**

En ĉi tiu teruriga tempo ni, nunaj kaj eksaj aktivuloj de E-movado en Rusio kaj estraranoj de la Rusia Esperantista Unio, sendas nian plej sinceran kunsenton kaj plej bonajn dezirojn al la ukrainiaj samideanoj. La agreso de la rusia registaro estas nepermesebla kaj ne ĉiuj esperantistoj el Rusio subtenas ĝin.

Ni esperas, ke plejmulto de tiuj estas kontraŭ la milito, malgraŭ unuopaj eldiroj favore al ĝi.

Ni esperas, ke la milito plej baldaŭ finiĝos.

Ni esperas, ke Ukrainio, ties loĝantaro kaj interalie geesperantistoj postvivos ĝin.

Ni esperas, ke ukrainiaj esperantistoj ankaŭ estonte havos bonajn rilatojn kun rusiaj samideanoj.

Milito ne estas solvo. Milito estas kontraŭhoma. Milito estas kontraŭ la ideo de Esperanto kaj esperantismo.

[La samaj subskribintoj]

Fonto: <https://web.archive.org/web/20220227210440/https://www.liberafolio.org/2022/02/27/rusaj-esperantistoj-kontrau-la-milito>

**AIKO**

## **Distanciĝo de la antaŭnelonga deklaro pri la eventoj en Ukrainio**

La 27an de februaro 2022 en “Libera folio” aperis notico sub la titolo «Rusiaj esperantistoj kontraŭ la milito», kiu enhavis deklaron pri la ukrainiaj eventoj. La deklaron subskribis kvin personoj: G. Arosev, A. Blinov, I. Gonĉarova, N. Gudskov, G. Kokolija. Ĝia teksto post unu tago iom ŝanĝiĝis, do mi donu ligilon al “Sezonoj” <https://sezonoj.ru/2022/03/reu-6>, kie interesiĝantoj povas legi kaj la originan kaj la finan version de tiu deklaro (*vidu ĉi-supre. – La red.*).

Venas maltrankvilaj demandoj de kelkaj homoj pri rilato de REU al tio.

Responde al tiuj demandoj, mi atentigas:



1) Rusia Esperantista Unio havas neniun rilaton al tiu deklaro.

La deklaro estis verkita kaj subskribita de privatuloj, kiuj elpaŝas en sia propra nomo, sed ne en la nomo de REU kaj des pli ne en la nomo de la tuta esperantistaro rusia.

2) Oficiala pozicio de REU pri tiom sentebla afero povus aperi nur kiel decido de la Estraro, kio ne okazis, kaj espereble ne okazos.

3) La opinioj pri la ukrainiaj eventoj estas ekstreme kontraŭaj en la socio. Oficiala subteno de unu el pozicioj signifus fortan neglekton de granda parto de nia membraro, kiu havas la malan pozicion. Ekzemple, persone mi kiel privata persono plene kaj senkondiĉe subtenas la specialan operacion de la rusia armeo, kiu okazas nun en Ukrainio. Se la Estraro oficiale deklarus ion kontraŭ ĝi – mi demisius kaj komencus batali por nuligo de tia deklaro fare de nia supera organo (Konferenco de REU).

Do, la plej adekvata pozicio de REU kiel organizaĵo rilate al la temo – simple diri nenion pri ĝi.

**Aleksandr Lebedev**  
prezidanto de REU



## Responde al Lebedev

Hodiaŭ aperis en la tre valora “sezonoj.ru” jena deklaro de Aleksander Lebedev kiel prezidanto de REU:

“Persone mi kiel privata persono plene kaj senkondicite subtenas la specialan operacion de la rusia armeo, kiu okazas nun en Ukrainio”.

Neniam dum mia pli ol 40-jara esperantista vivo mi tiom profunde glaciigis de hororo legante ĉi tiun furiozon. Sinjoron Aleksander Lebedev mi petas legi kaj serioze priatenti jenan vorton en la evangelio de Sankta Mateo: “Ĉion ajn, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili” (Mat 7, 12).

Mi bedaŭregas lian de mi admiratan popolon, kies prezidento Vladimir Putin nun ĉiun tagon pli videble fariĝas senlime agresa amok-gvidanto. Mi bedaŭregas la ukrainan popolon kaj ĉiujn ceterajn najbarajn popolojn de Rusia Federacio.

Funebre  
**Benoît Philippe**

# Stipendioj Marjorie Boulton

**Esperantic Studies Foundation** (ESF) anoncas sian konkurson de 2022 por esplorstipendioj en ĉiuj fakoj de la homaj kaj sociaj sciencoj, precipe se kun rilatoj al interlingvistiko, lingva justeco, interkultura komunikado, Esperanto kaj parencaj fenomenoj. Interfaka laboro estas bonvena, kaj ĉeffakoj povas inkluzivi lingvistikon, sociologion, historion, antropologion, komunikadon aŭ amaskomunikilojn, sed ne estas limigitaj al ili. Apertan al kandidatoj tutmonde, kun prefero por kandidatoj en Nordameriko kaj la tutmonda sudo, la stipendion oni povas utiligi samtempe kun aliaj premioj kaj stipendioj kaj ne estas renovigebla.



La stipendioj honoras la memoron de Marjorie Boulton, fekunda aŭtoro de teatraĵoj, poemoj, kaj prozo en Esperanto kaj ankaŭ la ĉefa anglalingva biografo de L. L. Zamenhof.

ESF, neprofitcela organizaĵo kiu laboras por lingva justeco tutmonde, valoras inkluzivadon kaj diversecon. ESF ne diskriminacias surbaze de raso, koloro, lingvo, landa deveno, handikapo, religio, aĝo, seksa orientiĝo, aŭ genra esprimo.

ESF celas aljuĝi stipendiojn de po 10.000 USD en du kategorioj laŭ la esploristo: antaŭdoktoriĝa kaj postdoktoriĝa. Vidu sube la plenajn postulojn.

**Kategorio 1.** Stipendio por la esplorado de doktoriĝanto, kiu jam komencis aŭ tuj komencos sian disertacion.

Postuloj: Kandidato devas esti matrikulinto en esplor-bazita doktora programo de akreditita universitato, atestata kiel plenrajta studento (t. e., sen institucia baro al plustudado), kaj esplorado aŭ esploranto pri io originala kaj konsiderinda en sia fako.

**Kategorio 2.** Stipendio por la esplorado de jama doktoro, kiu lastatempe doktoriĝis per sia disertacio kaj bezonas subtenon al ligitaj esploroj kaj eldonado.

Postuloj: Kandidato devas esti diplomiĝinta kiel doktoro en la lastaj kvin jaroj kaj proponi originalan kaj konsiderindan esplorprogramon. Oni povas daŭrigi la esploron de sia disertacio aŭ komenci novan esploron.

Ekzistas neniu geografiaj limigoj; homoj el ajna lando povas kandidatiĝi. La esplorpropono mem devas esti en la angla aŭ Esperanto. La aliaj materialoj, kiuj subtenas la kandidatiĝon, povas esti en la angla, Esperanto, aŭ la lingvo uzota en la disertacio aŭ postdoktoriĝa esplorado.

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



Intra Esperanto Lernejo, Krynica G.12-20 III.1989. Foto: A. Sochacki

Estas preskaŭ nekredeble, ke dum la 1970-80aj jaroj la plej interesaj Esperanto-projektoj en Pollando – movadaj, sciencaj, kulturaj – okazis ekster la tradicia Esperanto-movado, kadre de la legenda PSEK, funkciinta sub la tegmento de la (Socialisma) Asocio de Pollandaj Studentoj. Legu pli pri PSEK, fondita antaŭ 50 jaroj, en la artikolo de Jarosław Parzyszek. (Foto: Andrzej Sochacki)



# Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2022

**4.** Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Vilho Setälä** (1892-1906-1985), pioniro de la finnlanda fotoarto, kreinto de la finnlingva fotoleksiko kaj la plej konata finna esperantisto; sekretario (1918-22) kaj prezidanto (1955-65) de Esperanto-Asocio de Finnlando, ĝenerala sekretario de la 14a UK (Helsinki, 1922), fondinto kaj redaktoro de *Esperanta Finnlando* (1918-73, kun paŭzoj); komitatano de UEA (1920-63), membro de la Akademio de Esperanto (1930-85); aŭtoro de pluraj vortaroj, lernolibroj kaj libroj en/pri Esperanto inkluzive de la finna-Esperanta vortaro (1923) kun pli ol 30 mil kapvortoj kaj lernolibro *Privilegia vojo al lingvoscio: Esperanto kun kvar internaciaj, tri finnaj kaj du svedaj eldonoj*; honora membro de UEA (1933), honora prezidanto de EAF (1979).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 255-257) kaj en artikolo de Aleksander Korĵenkov <http://sezonoj.ru/2017/04/setala>.

**10.** Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **György Nanovfszky** (1942-1958-2021), hungara filologo, ĵurnalisto, verkisto, diplomato kaj esperantisto; reprezentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo (1982-86), prezidanto de HEA kaj ties komitatano A en UEA (1998-2006), kortumano de la Esperanta Civito (2013-21), vicprezidanto de la Esperanta PEN-Centro (de 2013), prezidanto de la societo Fajsz Amika Rondo (2012-21); ĉefredaktoro de *Planlingvistiko* (1982-86), redakciano de *Hungara Vivo* (1988-90) kaj *Literatura Foiro* (1986); honora prezidanto de HEA (2007) kaj honora membro de UEA (2012). En 2015 intervjuoj kun György Nanovfszky, kiujn faris I. Neme-re, aperis libroforme kun la titolo *Nano. Aventuroj de poliglota diplomato en kvin kontinentoj*.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 210-211) kaj en nekrologo, publikigita en nia novaĵretejo <https://sezonoj.ru/2021/08/nanovfszky>.

**11.** Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjajev** (Иван Геннадьевич Ширяев, 1877-1895-1933), Ruslanda kaj Sovetunia instruisto, rusortodoksa pastro kaj esperantisto (№3228, laŭ la Zamenhofa "Adresaro"), iniciatinto-ĉefredaktoro de la *Enciklopedio de Esperanto*, eldonanto-redaktoro de *La Rondiranto* (1918-22, 43 numeroj), aŭtoro de pluraj novel(ar)oj (*Sep rakontoj*, 1906; *La ciganino*, Brajla eldono 1907; *Tra la loko ensorĉita*, 1913; *Forta impresio*, 1914; *Peko de Kain*, 1932) kaj de la posteume (1995) eldonita romano *Sen titolo*, kiun kelkaj fakuloj konsideras la plej frua originala Esperanto-romano kaj la plej interesa el la fruaj romanoj verkitaj en Esperanto; tradukinto de *Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia* de Zamenhof (1906).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 277-278) kaj en la artikolo *Ivan Ŝirjajev, la iniciatinto de nia Enciklopedio* de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2017/04/shirjajev>.

**12.** Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Jacques-Louis Mahé** (ĵak-luĭ maé, 1912–1928-1992), franca fotisto, filmprojekciisto, filmisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Lorjak; pioniro de la Esperanta kino (*Antaŭen* 1936; *Angoroj*, 1964); aŭtoro de sep romanoj (*Neologisme*, 1975; *Transe*, 1976; *Retoj*, 1978; *Regulus*, 1981; *Eŭlalia*, 1984; *Mariagnes*, 1986; *Kromosomoj*, 1989) kaj unu novelaro (*Iluzioj*, 1982) – pro ĉi tiuj verkoj plejparte leĝertemaj kaj humurplenaj, kun pluraj burleskaj kaj absurdaj epizodoj, surprizaj intrigoturnoj kaj suka lingvaĵo, oni ofte taksas lin la ĉefa figuro en la amuza Esperanto-literaturo.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 188-189.

**14.** Antaŭ 105 jaroj mortis **Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof** (Лазарь Маркович Заменгоф, 1859-1887-1917), ruslanda juda okulkuracisto, aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto (1887) kaj de aliaj lerniloj, tradukinto de pluraj beletraĵoj kaj de la Malnova Testamento, redaktoro de la unua Esperanto-gazeto (*La Esperantisto* (1889-95), fondinto de la religia-etika doktrino homaranismo, nomita de siaj samtempaj esperantistoj “La Majstro”. Lia poemo *La Espero* estas la himno de Esperanto.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 304-306). Pri la lastaj jaroj kaj pri la forpaso de Zamenhof legu la artikolon *Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile...* de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2021/04/zamenhof-26>.

**15.** Antaŭ 110 jaroj en la katastrofo de la ŝipo “Titanic” pereis **William Thomas Stead** (1849-1912), angla ĵurnalisto, pacifisto kaj filantropo, pioniro de Esperanto en Britio, en 1902 fondinta Esperanto-rubrikon en sia revuo *The Review of Reviews*.

**18.** Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Koffi Gbeglo** (1957-1984- ), togolanda instruisto kaj esperantisto; aktiva disvastiganto de Esperanto en Afriko, kunfondinto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (1987), fondinto kaj redaktoro de kelkaj Esperanto-bultenoj, fondinto de TIETTI-Instituto de Esperanto (1992) ĉe kiu en 2004 ekfunkciis la lernejo Instituto Zamenhof; membro de Internacia Ekzamena Komisiono de UEA/ILEI (1994-2006), estrarano de UEA (1998-2004), kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA (2004-06), fondinto (2006) de Afrika Centro Esperanista; aŭtoro kaj kompilinto de kelkaj libroj kaj broŝuroj; membro de la Akademio de Esperanto (2004-12), laŭreato de la premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski (1997).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 102.

**22.** Antaŭ 45 jaroj mortis **Lakshnishvar Sinha** (1905-1928-1977), bengala instruisto, kunlaboranto de Rabindranath Tagore, eminenta barata esperantisto, farinta per Esperanto prelegvojaĝojn en Eŭropo, fondinto de Bengala Esperanto-Instituto (1963), aŭtoro de Esperanto-lernolibro por bengaloj (1974) kaj de kelkaj libroj, interalie, de la membiografiaj verkoj *Hindo rigardas Svedlandon* (1936) kaj *Jaroj sur tero* (1966), tradukinto de la novelaro de Tagore *Malsata ŝtono*, kiu aperis en 1961 kiel la unua volumo de la libroserio “Oriento-Okcidento”.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegato* (p. 260-261) kaj en artikolo de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2017/04/sinha>.


**25.** Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Josef Kavka** (1922-1948-2019), geologo, petrologo, instruisto kaj esperantisto, populariganto de scienco inter esperantistoj kaj de Esperanto inter sciencistoj; ĝenerala sekretario de ISAE (1971-80), ĉefredaktoro de *Scienca Revuo* (1978-87), redaktoro de *Geologio Internacia* (1968-90), aŭtoro de pluraj sciencaj, prilingvaj kaj terminologiaj artikoloj, kaj de la libroj *Ĉu leŭcito en Bohemio?* (1995) kaj *Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature* (1996); honora membro de UEA (2003).

Aleksander Korĵenkov

## Lingva Tereno

2021-12-15

### Rigardo malantaŭ la sanktulan bildon



Ĉi tiu Zamenhof-tago estas taŭga momento por iom rigardi malantaŭ la sanktulan bildon, kiun ni esperantistoj havas pri la iniciatinto de nia lingvo, kaj trovi tie la homon Zamenhof. Per “sanktula bildo” mi celas la kutiman historion, simpligitan kaj idealigitan, pri la unuaj jardekoj de Esperanto. Laŭ tiu kutima historio, Zamenhof, publikiginte sian genian lingvon en 1887, kuraĝe defendis ties bazan strukturon kontraŭ reformemuloj, ĝis en la unua kongreso en 1905 la esperantistoj fine akceptis la Fundamenton kiel la neŝanĝeblan bazon de la lingvo. Inter la esperantistoj restis tamen reformemuloj, kiuj en 1907–1908 kreis sian propran planlingvon Ido kaj perfide forlasis Esperanton. Sed

#### Blogiarkisto

- ▼ 2021 (9)
  - ▼ [joulukuuta](#) (1)
    - Rigardo malantaŭ la sanktulan bildon
  - ▶ [elokuuta](#) (2)
  - ▶ [heinäkuuta](#) (1)
  - ▶ [huhtikuuta](#) (2)
  - ▶ [maaliskuuta](#) (2)
  - ▶ [helmikuuta](#) (1)
- ▶ 2015 (7)
- ▶ 2014 (18)

#### Tietoja minusta

 [Jouko Lindstedt](#)

**Rigardo malantaŭ la sanktulan bildon.** — La 15an de decembro 2021, je la Zamenhofa Tago, Jouko Lindstedt publikigis en sia retejo “Lingva Tereno” la artikolon *Rigardo malantaŭ la sanktulan bildon* pri la reala rolo de Zamenhof, surbaze de ties vivo kaj ideoj, prezentitaj en la libro *Homarano* de Aleksander Korĵenkov. La artikolo estas legebla ĉe:

<https://lingvatereno.blogspot.com/2021/12/rigardo-malantau-la-sanktulan-bildon.html>

# La 50a naskigdato de PSEK (1972-1992)



La 15an de februaro 1972 en Zakopane dum Vintra Universitato de Studentoj-Esperantistoj estis fondita Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK) ĉe Asocio de Polaj Studentoj (pole: Zrzeszenie Studentów Polskich = ZSP), kiel reprezent-aĵo de sendependaj studentaj: edukaj, sciencaj, kulturaj kaj turismaj Esperanto-rondoj kaj kluboj funkciantaj en kelkaj Pollandaj altlernejoj.

PSEK neniam estis sendependa organizaĵo, ĝi eĉ ne estis organizaĵo laŭ la jura vidpunkto. Ĝi estis “tegmenta” reprezentaĵo de polaj studentoj-esperantistoj, konsistanta el po unu reprezentanto de la studentaj rondoj kaj kluboj, funkciantaj en Pollando kadre de la strukturoj de (Socialisma) Asocio de Polaj Studentoj. PSEK, diference de la ĝenerala Esperantomovado, substrekadis ke pli gravas uzado de Esperanto ol agado por Esperanto kaj neniam deklaris sian “neŭtralecon”. Sian “programon” PSEK klarigis en sia deklaro akceptita en 1980 [https://eo.wikipedia.org/wiki/Deklaro\\_de\\_PSEK\\_\(1980\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Deklaro_de_PSEK_(1980)).

## Kio estis (S)APS?

La organiza kaj financa bazo por la plimulto de la rondoj estis Asocio de Polaj Studentoj (APS). Studentaj esperantistaj kluboj kaj rondoj aperis fine de la 1950aj kaj komence de la 1960aj jaroj en kelkaj universitatoj: Krakovo, Lodzo, Toruno, Varsovio. Ili kunlaboris kun APS aŭ eĉ funkciis kadre de APS.

APS estis amasa organizo, fondita en 1950, al kiu en la 1960aj kaj 1970-aj jaroj apartenis plimulto de la polaj studentoj. Tiutempe la studentoj kaj preskaŭ ĉiuj interesgrupoj en Pollando devis elekti formon de oficiala agado kadre de iu junulara organizaĵo, agnoskita de la ŝtato. Krom APS tiuj estis: Socialisma Asocio de la Pola Junularo, Asocio de la Vilaĝa Junularo kaj Asocio de la Pola Skoltaro. Nur tiuj organizaĵoj, kiuj akceptis politikon de la registaro, estis tolerataj kaj subvenciataj de la ŝtato. La komunisma ŝtato difinis iliajn regularojn kaj malavare subtenis diversajn formojn de la “oficiala” junulara aktivado – eldonaĵojn kaj aranĝojn kulturajn, sportajn, turismajn, sciencajn. En 1973 APS estis transformita al SAPS – Socialisma Asocio de Polaj Studentoj (ekde 1982 denove nur APS) kaj kune kun la aliaj junularaj organizaĵoj kunfondis Federacion de Socialismaj Asocioj de Pola Junularo.

La ŝtato “zorgis”, ke la junularaj organizaĵoj ne fordrivu en “malĝustan” direkton. En la Centra Komitato de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio funkciis departemento respondeca pri junularo kaj ties stirado. Tion ebligis la ŝtataj servoj: financaj – dividantaj subvenciojn, pasportoservoj – donantaj pasportojn kaj permesojn vojaĝi eksterlandon, cenzuroficejoj – zorgantaj pri la ĝusta enhavo de libroj, revuoj,

spektakloj, kantotekstoj, radiaj kaj televidaj programoj, polico kaj sekretservoj kun miloj da dungitoj kaj dekmiloj da kunlaborantoj. La kontrolado okazis ankaŭ helpe de la internaj strukturoj de la organizaĵoj, lok- kaj landnivele.

## **Universitate en Varsovio, Lodzo, Toruno kaj aliloke**

PSEK funkciis unue ĉe la Lodza Regiona Konsilio de APS, kaj post 1974, ĉar la plej multaj studentaj Esperanto-rondoj kaj kluboj havis en siaj nomoj la vorton “sciencia” helpe de la Scienca Komisiono de la Ĉefa Konsilio de APS. Laŭ Ryszard Rokicki, la adjektivo “sciencia” en la nomoj de la studentaj rondoj estis sekvo de la difino de la “studenta scienca movado” en la Pola Popola Respubliko. Temis pri memstara edukado kaj akirado de eksterprogramaj (krom la baza studprogramo) scioj. La studado de kaj per Esperanto tre kongruis kun tiu difino.

En Varsovio, ĉe la strato Ordynacka 9, ni kelkfoje dum ĉiu semajno deĵoradis, telefonadis, tajpadis, multobligadis, pakadis, enpoŝtigadis... Niaj deĵorantoj, kutime PSEK-estraranoj, povis uzi la teknikan bazon de APS: tajpilon, stencilon per kiu ni multobligadis ĉiumonatajn *Komunikaĵojn*, kaj la poŝtosistemon – ni dissendis ĉiumonate kelkdek, ofte kelkcent leterojn; dum la deĵorado ni realigis multekostajn, interurbajn kaj internaciajn telefonajn interparolojn.

Helpe de APS ni regule ricevis subvenciojn por niaj landaj aranĝoj, eldonaĵoj kaj vojaĝoj. La scienca karaktero ebligis ricevadon de ŝtataj subvencioj por sciencaj kaj edukaj eldonaĵoj, esplorvizitoj kaj aranĝoj pri diversaj temoj: Esperanto, interlingvistiko, paco, kosmo, Koperniko, literaturo ktp.

Ne ĉiuj studentoj, kiuj aktivis en PSEK (eĉ ne ĉiuj estraranoj) estis membroj de (S)APS. La statutoj de unuopaj rondoj/kluboj (ekzemple tiu de la Toruna Universitato) permesis ke (S)APS membroj konsistigu nur la plimulton de la membraro, kaj la rondestroj, sciante ke ne ĉiuj esperantistoj deziras membriĝi en (S)APS, “membrigadis” siajn gekolegojn. (S)APS-membroj, kiuj formale aktivis en la studentaj Esperanto-rondoj, ne devis pruvi sian aktivadon alikampe, kaj dank’ al tio ili ricevis subvenciojn, partoprenis ekskursojn, internaciajn laborbrigadojn ktp.

Kelkaj studentaj rondoj sukcese provis sciencigi la esploradon pri Esperanto, interlingvistiko kaj pri internacia lingva komunikado: ekzemple, tiu de la Varsovia Universitato, gvidata i.a. de Ryszard Rokicki, Barbara Jędrzejczyk (poste Rokicka), Elżbieta Czyż kaj Jerzy Leyk. La varsovianoj el la studenta scienca rondo de la Varsovia Universitato (poste Akademia Centro Interlingvistika) ekde 1973 okazigis en/apud Varsovio Sciencajn Interlingvistikajn Seminariojn/Simpoziojn (SIS).

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Kulturo



En ĉi tiu *Ondo* startas nova literatura projekto, la dua kolekto “Rusa Novelaro”, en kiu aperos mallongaj prozaj verkoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento. La serion komencas noveloj de Ivan Bunin – la unua rusa nobelpremiito pri literaturo kaj la unua “verkisto en ekzilo” ricevinta ĉi tiun premion.

# Nova serio: *Rusa Novelaro 2*

En la antaŭa, decembra *Ondo* aperis fragmentoj el *Moskvo – Petuŝki* de Venedikt Jerofejev. Per tio finiĝis la prezentado de dek romanoj de pasint-jarcentaj rusaj verkistoj. Niaj legantoj, kiuj kutimas legi ĉiunumere Esperantajn tradukojn de elstaraj rusaj verkoj, nature atendas daŭrigon. Tio povus esti serio de romanoj modernaj, aŭ felietoneca publikigado de iu ĝis nun netradukita roman(et)o.

Sed post iom da pripensado ni decidis reveni al projekto komencita, sed ne finita.

Meze de la 1990aj jaroj Nikolai Lozgaĉev kaj mi eklaboris pri la projekto *Rusa novelaro*. Frontinte la taskon, ni komprenis, ke ne eblas prezenti la rusan literaturon en nur unu libro, kaj ni kompilis la titolaron de *Rusa novelaro. Volumo 1. La 19a jarcento* (RuNo-1). Pro la forpaso de Nikolai (1998) la projekto longe stagnis, kaj RuNo-1 aperis nur en 2003.

Vi jam komprenas, pri kio temas: RuNo-2 realiĝos ne libroforme, sed gazete. Dum kelkaj proksimaj jaroj en ĉiu *Ondo* aperos prozaĵetoj de rusaj aŭtoroj, kiuj publikigis siajn ĉefajn verkojn en la 20a jarcento. La unua aŭtoro ĉi-seria estas Ivan Bunin.

Iván Alekséjeviĉ Búnin (Иван Алексеевич Бунин) naskiĝis la 10an (Gregorie: la 22an) de oktobro 1870 en Voroneĵ, en fama, sed malriĉiĝinta nobela familio kaj pasigis sian infanaĝon en kamparo. Ne fininte la gimnaziajn studojn en Jelec, li revenis hejmen kaj ekde 1889 laboris en Ĥarĵkov, Orjol kaj Poltava kiel korektisto, ĵurnalisto, bibliotekisto, statistikisto. En 1895 li ekloĝis en Peterburgo, kaj baldaŭ poste en Moskvo.

Jam en la okjara aĝo li verkis sian unuan verŝaĵon, kaj en februaro 1887 poemeto de la 16-jara Ivano estis presita en gazeto, en 1891 aperis lia unua poemaro kaj en 1897 la unua novelaro *Al la rando de l' mondo*, sed ili estis apenaŭ atentitaj, kaj famigis lin lia traduko de *La kanto de Hiawatha* de Longfellow (1896) kaj la vilaĝa novelo *Antonovaj pomoj* (1900). Lia posta vivo – sesvoluma verkaro (1915), elmigro (1920), vivo en Francio, romano *La vivo de Arsenjev* (1929), novelaroj *La gramatiko de amo* (1929) kaj *La mallumaj aleoj* (1943, 1948), Nobelpremio (1933), la Dua Mondmilito, kaj la morto en Parizo la 8an de novembro 1953 – estas bone konata, kaj facile konsultebla en la reto. Mi ne ripetu la konataĵojn, sed diru kelkajn vortojn pri la elektitaj tekstoj.

Tri el ili (*La facila spirado*, *Sunfrapo* kaj *En Parizo*) estas krestomatiaĵoj, kiujn enhavas preskaŭ ĉiu reprezenta verkaro de Bunin. Al ili mi aldonis unu fruan rakonton el la “vilaĝa epoko” (*En bieneto*) kaj unu leĝeraĵon el la lasta vivoperiono (“*Madrido*”). Ĉar ne estus dece, se la tuto superus 30 paĝojn, ekster la nuna kolekto restis pliaj “klasikaĵoj”: *Sinjoro el San-Francisko*, *La gramatiko de amo*, *La pura lundo* kaj *Rusja* (ĝia traduko de Grigorij Arosev aperis en *Rusaj amnoveloj*, 2000); al tiuj mi aldonus ankaŭ la am(or)noveleton *Vizitkartoj*, sed tio estus jam libro eble 70-paĝa. Do, nur kvin tekstoj.

Agrablan legadon!



Aleksander Korĵenkov

## En bieneto

La vesperruĝo estis tre longe finbrulanta ĝis pala ruĝeto. La nekaptebla lumo kaj la nekaptebla krepusko miksiĝis super la ebenaj grenkampoj. Komencis mallumiĝi ankaŭ la vilaĝo – nur fenestroj de la dometoj apud la paŝtejo ankoraŭ kupre rebrilis. La vespero estis silenta kaj kvieta. La vilaĝanoj revenis post la laboro, enstalis la brutojn, vespermanĝis sur ŝtonoj antaŭ siaj dometoj kaj kvietiĝis. Neniu kantis, la infanoj malkriemis...

Ĉio mergiĝis en la vesperan pensadon. Enpensiĝis ankaŭ Kapitono Ivanoviĉ, sidanta ĉe la aperta fenestro.

Lia bieno staris surmonte: la etarba ĝardeno, konsistanta el akacioj kaj siringoj, plena da lapoj kaj artemizioj, malleviĝis al la dekliva ebenaĵo. El la fenestro tra la arbustoj oni povis vidi malproksimen.

La kampo silente kuŝis en pala mallumo. La aero estis seka kaj varma. La steloj diskrete kaj mistere trembriletis en la ĉielo. Kaj nur saltuloj senlace muzikadis inter la subfenestraj artemizioj, kaj en la stepo koturno klare krietis: “Kvit-kvivit”.

Kiel ĉiam, Kapitono Ivanoviĉ estis sola. La soleca vivo estis kvazaŭ destinita al li. Liaj gepatroj, tre malriĉaj etbienaj nobeloj, loĝintaj ĉe la princa familio Nogajskij, mortis kiam li ne atingis eĉ unujaran aĝon. Siajn infanaĝon kaj adoleskon li pasigis en la domo de sia freneza onklino, maljuna fraŭlino, kaj en la kantonista lernejo<sup>1</sup>. En sia junaĝo li verkis kanzonojn, imitante la stilon de Deljvig<sup>2</sup> kaj Koljcov<sup>3</sup>, nomante sian damon Valentena – reale ŝi havis la nomon Anjuta, kaj ŝi estis filino de oficisto, kiu servis en komisarejo, – sed li ne ĝuis ŝian reciprokecon.

Lia nomo estis “tipe ĉambroservista”, lia aspekto tute ne atentindis; malhelhaŭta, magra kaj alta, li, laŭ liaj konatoj, similis seminarianon eĉ tiam, kiam danke al la protekto de la princo (oni ne vane parolis, ke la princo estas patro de Kapitono Ivanoviĉ) li atingis la oficiran rangon. Tiutempe li heredis la onklinan bienon kaj ekŝiĝis el la armeo. Li ankoraŭ imagis sin jen heroo el iu romano de Marlinskij<sup>4</sup>, jen eĉ Peĉorin<sup>5</sup>, li havis la novmodan hararanĝon “à la polka”... Sed tio donis neniun rezulton. “Valentena” forveturis al sia amikino por gastoj kaj tie edziniĝis, kaj li “ĝis sia lasta spiro” ŝlisis siajn poemojn en la komodo.

Li ekokupiĝis pri juĝejaj pledoj kaj intencis servi en la ĵus fondita zemstvo, sed ankaŭ en la zemstvo li malsukcesis: la nobelestro<sup>6</sup> foje manĝetante ĉe la bufedo de la nobeldomo, diris, ke Kapitono Ivanoviĉ estas “bonulo, sed fantaziulo, mal-noveca fantaziulo... tipo jam finvivanta sian tempon...” Kapitono Ivanoviĉ konatiĝis kun siaj etbienaj najbaroj kaj ekŝatis ĉasadon, akirinte por si la halthundon Ĝalma kiel neanstataŭigeblan amikon. Kaj tagoj sekvis tagojn, kuniĝante en jarojn... Li iĝis vera etbienulo, li vestiĝis per ĉiutageca uniforma jako kaj havis longajn nigrajn



lipharojn; li forgesis eĉ pensi pri sia aspekto kaj probable ne sciis, ke lia malhelhaŭta kaj kelkloke variolsignita vizaĝo estas tre alloga pro la trankvila bonkoreco videbla en ĝi...

Hodiaŭ li tristis. Matene vizitis lin la pilgrimantino Agafja, lia eksa servistino, kaj diris interalie:

- Sinjoro, ĉu vi memoras pri Anna Grigorjevna?
- Mi memoras, – Kapitono Ivanoviĉ diris.
- Ŝi mortis. Entombigita dum la Granda Fasto.

Kapitono Ivanoviĉ dum la tuta tago malklare ridetis. Kaj vespere... La vespero iĝis tiel kvieta kaj trista.

Kapitono Ivanoviĉ ne vespermanĝis, mallaŭ sia kutimo ne enlitiĝis frue. Li volvis dikan cigaredon kun forta nigra tabako kaj longe sidis ĉe la fenestro, ŝovinte sub sin unu piedon.

Li deziris ien iri. Kiel homo, kutimiĝinta ĉion trankvile pripensi, li demandis sin: “kien?”. Ĉu ĉasi koturnojn? Sed jam noktiĝis kaj mankis kuniranto. Semjon nun estas ĉe la nokta paŝtado... Kaj por kio tiuj koturnoj!

Li suspiris kaj gratis sian longe nerazitan mentonon.

Ja kiel mallonga kaj malriĉa estas la homa vivo. Ĉu antaŭ longa tempo li estis knabo, junulo? La kantonista lernejo – bone, ke tiuj ne plu ekzistas – frosto, malsato, vojaĝoj al la onklino... Kia homo ŝi estis! Li bonege memoris ĉi oldan magran fraŭlinon kun taŭzitaĵ, sekaj nigraj haroj kaj frenezaj okuloj – oni diris, ke ŝi freneziĝis pro malfeliĉa amo, – li memoris, kiel ŝi, laŭ la malnova instituta kutimo, parkere recitis francajn fablojn, levante siajn okulojn kun beate grava mieno; li memoris ankaŭ la “Polonezon” de Ogiński<sup>7</sup>... Ĝi sonis pasie kaj nekutime, ĉar la olda fraŭlino ludis ĝin kun freneza pasio. Aĥ, tiu polonezo! Kaj ŝi ludis ĝin...

La steloj en la ĉielo lumas tiel modeste kaj enigme; la saltuloj seke kraketas, kaj tiu flustrado-kraketado lulas kaj emocias... En la salono staras malnova fortepiano. La fenestroj tie estas apertaj. Se tien nun venus ŝi, malpeza kiel fantomo, kaj ekmuzikus, tuŝante la malnovajn sonore resonantajn klavojn! Kaj poste ili elhejmiĝus kaj unu apud la alia ekirus sur kampa vojeto, inter sekalaj kampoj, rekte tien, kie en fora foro briletas la lumo de l’ okcidento.

Kapitono Ivanoviĉ ekregis sin kaj ridetis:

- Mi tro-en-fantazi-iĝas, – li diris per sia flua voĉo.

La saltuloj kraketadis en la kvieta vespera aero, kaj el la ĝardeno venis odoro de lapoj, palaj, altaj levistokoj kaj urtikoj. Ĉi tiu odoro memorigis la vesperojn, kiam li venis hejmen el la urbo, kaj estis por li dolĉe pensi pri ŝi, trompi sin per espero pri feliĉo.

Neniu fajro lumis en la vilaĝo, dum li alsupris la monton. Ĉio dormis sub la sen-nuba stelplena ĉielo. Mallumaj kaj varmaj estis la aprilaj noktoj; en ĝardenoj milde bonaromis padusoj, ranoj en laĝetoj lanĉis sian dormeman, sonoretantan muzikon, tiel konvenan al la frua printempo... Kaj longe li ne povis ekdormi, kuŝante sur pajo

en la ĝardeno branĉkabano! Dum horoj li rigardis ĉiun fajreton, kiu briletis kaj malaperis en la malklare lakteca nebulo de foraj valoj; kiam de tie, el sovaĝa lageto iam venis kriĉo de ardeo – ĝi ŝajnis mistera, kaj misteris la obskuro en la aleoj... Kaj kiam antaŭ la aŭroro, saturita de suka freŝo de l' ĝardeno, li malfermis siajn okulojn – tra la duone nekovrita kabana tegmento al li rigardis ĉastaj antaŭmatenaj steloj...

Kapitono Ivanoviĉ stariĝis kaj ekiris en la domo. Liaj paŝoj resonis en la ĉambroj, la plankoj kelkloke fleksiĝis kaj knaris.

“La dometo aĝas okdek jarojn! – Kapitono Ivanoviĉ pensis. – Do aŭtune necesos venigi ĉarpentistojn, sen tio vintre estos terura frostoj!”

Paŝante en la salono li sentis sin iom malkomforte. Alta, magra, iomete ĝiba, en longaj malnovaj botoj kaj nebutonita jako, sub kiu estis videbla la ĉemizo kosoovorotka<sup>8</sup>, li vagis tra la salono kaj, levante siajn brovojn kaj balancante sian kapon, zumis la “Polonezon”. Li sentis, ke li mem observas siajn paŝojn kaj sian korpon, kaj imagas sin kiel alian homon, paŝantan en la duonlumo de l' malnova salono, homon kiu vagas tute sola, kiu tristas kaj kiun li kompatas ĝis doloro. Li surmetis sian kaskedon kaj eliris el la domo.

Ekstere estis pli hele. La lumo de l' vesperruĝo, estingiĝanta post la vilaĝo, ankoraŭ iomete disfluis en la korto.

– Miĥajla! – Kapitono Ivanoviĉ softe vokis la maljunan paŝtiston. Neniu respondis. Miĥajla “foriris siakorten, por ŝanĝi la ĉemizon”.

Penante trovi iun aferon por si, li iris tra la korto al la ŝedo: ĉu Mitjka falĉis herbon por la bovinoj? Sed pensante pri tute alia temo, Kapitono Ivanoviĉ nur iom staris ĉe la ŝedo.

– Mitjka! – li vokis.

Denove neniu respondis. Nur post la stala pordo tre peze suspiris bovino, kaj kokinoj sur la sidstango ekmoviĝis kaj svingetis siajn flugilojn.

“Sed por kio mi bezonas ilin?” – pensis Kapitono Ivanoviĉ kaj nehaste iris preter la ĉarejo tien, kie sur la deklivo kreskis sekalo. Susurante li penetris tra la sovaĝaj urtikoj al la altaĵeto, ekfumis kaj sidiĝis.

Vasta ebenaĵo kuŝis sube en pala obskuro. De sur la deklivo estis longe videbla la ĉirkaŭaĵo silente droninta en la krepusko.

“Mi sidas sur la altaĵeto kiel noktuo, – pensis Kapitono Ivanoviĉ. – La popolo diros, jen senokupa oldulo!”

“Ja vere – mi estas oldulo, – li plu meditis. – Baldaŭ mi mortos... Jen ankaŭ Anna Grigorjevna mortis. Kie ĉio estas, ĉio antaŭa?”

Li longe rigardis al la fora kampo, longe aŭskultis la vesperan silenton...

– Kiel tio eblas? – li diris voĉe. – Ĉio restos tia, kia estis antaŭe, la suno plu subirados, la kampuloj plu revenados el la kamparo kun renversitaj plugiloj... plu estos aŭroroj en la laborsezonoj, sed mi vidos nenion el tio, kaj mi ne nur ne vidos tion, mi tute malestos! Pasos eĉ mil jaroj, sed mi neniam aperos en la mondo, mi neniam venos kaj sidos sur ĉi tiu altaĵeto! Sed kie mi estos?

Kurbiĝinte, ferminte la okulojn kaj turetante per la maldekstra mano la nigran, griziĝantan lipharan faskon, li sidis balanciĝante...

Dum multaj jaroj li imagis, ke ie tie, antaŭe, estos io grava, esenca... Iam li estis knabo, li estis juna... Poste... en varmega tago li veturis en droŝko sur ŝoseo por la zemstva elektado! Kapitano Ivanoviĉ mem ridetis pro tia saltado de siaj pensoj...

Sed ankaŭ tio okazis antaŭ longe. Kaj jen li venas al la tempo, en kiu, onidire, ĉio finiĝas; sepdek, okdek jaroj... kaj poste oni ne plu kutimas kalkuli! Finfine, ĉu la vivo estas longa aŭ mallonga?

“Longa, – ekpensis Kapitano Ivanoviĉ. – Tamen, jes, longa!”

En la obskura ĉielo ekbrilis kaj falis stelo. Li levis supren siajn maljunulecajn tris-tajn okulojn kaj longe kontemplis la ĉielon. Kaj pro tiuj profundo kaj milda mallumo de l' stela senfineco al li iĝis pli facile. “Kio do! Mi kviete vivis, kaj kviete mi mortos, kiel siatempe sekiĝos kaj forfalos jena folio de ĉi tiu arbusto...” Nun la konturoj de l' kampoj apenaŭ videblis en la nokta krepusko. La krepusko densiĝis, kaj la steloj ŝajnis brili pli alte. Pli klare aŭdiĝis maloftaj kvivitoj de la koturnoj. La herbaodoro iĝis pli freŝa... Li facile, libere enspiris plenbruste. Kiel vivece li sentis sian proksiman parencecon kun ĉi tiu senvorta naturo!

1892

Tradukis **Aleksander Korĵenkov**

## Facila spirado

En la tombejo, sur freŝa argila tomboŝutaĵo staras nova kverka kruco, fortika, peza, glata.

Aprilo, grizaj tagoj. En la vasta distrikta tombejo ankoraŭ de fore tra la nudaj arboj videblas monumentoj, kaj la malvarma vento ade tintigas la funebran porcelanan kronon ĉe la piedo de l' kruco.

En la kruco estas enmuntita sufiĉe granda, konvekso porcelana medaliono, kaj en la medaliono estas fotoportreto de gimnaziano kun ĝojaj, mirinde vivoplenaj okuloj.

Ŝi estas Olja Meŝĉerskaja.

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Kvar rakontoj*

de Ĵenja Amis



**Vendredo, la 13-a**

Mi ŝategas nian novan oficejon. De tie mi vidas la tutan montrealan urbocentron, la Kvartalon de Spektakloj kaj eĉ la foran Olimpikan Stadionon, kiu kvazaŭ ŝvebas de malproksime, inter la nuboj, kiel giganta eksterterana estaĵo. Mi ankoraŭ iom perdiĝas serĉante ĝustan konferenc-ĉambron — “Ĉu vi scias, kie estas ‘Marteno, la Fotografo’?” “Kiu Marteno?” “La konferenc-ĉambro nomata ‘Marteno, la Fotografo’” “Ha, la ĉambro!” Ĉiuj niaj konferencejoj havas nomojn de diversaj filmoj de la Nacia Filmoficejo, mia laborejo.

Kiam ni translokiĝis al la nova konstruaĵo, ĉi-septembre, ni ĉiuj dividis la saman senton de ekscitiĝo pri nova laboro sen ajnaj el la malagrablajoj de nova enposteniĝo. Mi sentas, ke homoj eĉ iom ŝanĝiĝis kun la translokiĝo al la nova konstruaĵo — ni ridetas pli, esploras diversajn partojn de la alta arteca konstruaĵo kaj ofte haltas simple por babili. Inter niaj laborstacioj ne estas ajnaj bariloj — kiel eblas ne halti kaj ne iom babili? La koncepto de “malferma spaco” estas ja bela por ĉiuj jaroj... krom 2020! En la antaŭa laborejo, kiu aspektis iom kiel fabrika konstruaĵo de la 1950-aj jaroj, ĉiuj havis propran oficejon kaj ni renkontis kolegojn ĉefe en la kafeterio — ankaŭ iom industrieca kaj soveti-aspekta, sed multe amata. “Sekura laborejo por KOVIM”, ni ŝercas, “Ĉu eble ni translokiĝu reen?”

Mi estis inter tiuj malmultaj homoj, kiuj venis al la laborejo tiun vendredon, la 13-an de marto. Multaj miaj kolegoj laboras de hejme vendredojn ĝenerale, sed tiun tagon ni estis apenaŭ deko da homoj sur nia tuta etaĝo. La grupeto, kiu restis, estis aparte babilema. Nia kuna ĉeesto trankviligis nin — la aferoj tamen ankoraŭ normalas ĉe ni, eĉ se en kelkaj aliaj landoj aferoj ne bone iras — ĉu ne, ĉu ne? “Tiu viruso tute ne timigas min. Mi iros manĝi restoracie kun amikoj hodiaŭ, pro principo, kaj mi faros ĉion kiel antaŭe”, diras defie unu el miaj koleginoj. Multaj el ni estas ankoraŭ en tiu fazo...

Matene mi ricevas mesaĝon de la ĥoro de la montreala simfonio: pli frue tiun

semajnon mi ĝoje lernis, ke mi estis antaŭelektita por ĉeesta provprezento post sep tagoj — la prezentoj estas nuligitaj. Mi ne povas ne sarkasme malrideti pri la ironio de tio ĉi — mi havis tiom da okazoj aliĝi al ili antaŭe — kaj jen mi elektis la KOVIM-jaron por tion fari. Bele farite, fieru!

Urĝaj tekstmesaĝoj kun estraranoj de Esperanto-Societo Kebekia. Nuligi aŭ ne nuligi la vendredan kunvenon, jen demando. Ni nuligas. Espereble, neniu venos kaj la restoracio ne punos nin pro la lastminuta malmendo. Ni povas pensi pri nur unu afero — kio pri la Universala Kongreso en Montrealo? Mi estas paralizita pensante, ke iu kongresano povus malsaniĝi. Mi scias, ke nuligo estas tre verŝajna, sed mi eĉ timas diri tiun vorton mense al mi mem ĉi-momente.

Dum la tagmanĝa paŭzo mi iras al la vendejo por foti la malplenajn bretojn, kie antaŭe estis necesejpapero, faruno kaj pastaĵoj — pluraj tiaj fotoj jam aperis en Facebook. Kiu diable aĉetas amason da necesejpapero por malplenigi la bretojn? Homoj vere ridigas min.

Ial mi ne emas tagmanĝi kaj prenas nur glaciaĵon. La ceteron de la tago mi bedaŭras — kio, se mi kaptis la viruson? Mi ja ne purigis miajn manojn post la uzo de la kreditkart-maŝino, kiun tuŝis amaso da homoj antaŭe...

La estroj de mia laborejo sendas mesaĝon, ke oni rajtas labori de hejme venontajn semajnojn, se oni havas bonan kialon — sanproblemojn aŭ zorgas pri maljunuloj. Ricevinte la “enordo” de mia ĉefo (mi zorgas pri mia patrino, sed mi verdire ankaŭ volas labori de hejme kelkajn tagojn), mi pakas la komputilon en mian dorsosakon. Mi prenas nenion alian — post kelkaj tagoj mi ja revenos, ĉu ne?..


Mi haltas ĉe la dua etaĝo por forigi la anoncon pri la koncerto de nia katedrala ĥoro el la anonctabulo de nia manĝejo — mi metis ĝin tien nur antaŭ kelkaj tagoj. La manĝejo malplenas kaj aspektas mistere kun malmulte da lumo. Ĝi havas dik-egajn betonajn murojn kaj kliniĝantan plafonon kaj akustiko perfektas. Mi kantas al mi mem la unuan movimenton de la Rekvieto de Fauré — la Meso por Mortintoj. Tion ni devis prezenti, kun tricento da amatoraj kunkantistoj, komence de aprilo. La manĝejo daŭre malplenas kaj tio kuraĝigas min resti pli. Mi pluiras al la sekva movimento de la meso. Mia voĉo agrable reeĥas inter la muroj. Pie Jesu Domine, Dona eis requiem... requiem sempiternam. Donu al ili eternan pacon...

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Florada

de Paulo S. Viana



Kiam ŝi vekigis, frumatene kiel kutime, kiel kutime la hundineto kuŝis apud ŝi, sur sia tapiŝo. Sed io estis nekutima. Ĝi estis strange senmova kaj rigida, la postaj kruroj iom etenditaj, la kapeto iom kurbiĝinta. Ada saltis el la lito kaj ekpalpis la hundineton; Floro estis malvarma, rigida, senspira. Ankaŭ Ada dum momento ne povis spiri, ĝis ŝi povis ekkompreni: mortinta. Nokte ĝi mortis, sur sia tapiŝo. Absurde mortinta, sen ia antaŭa sciigo, senaverte. La junulino rigardis al la grizeta muro de sia dormoĉambro, en la vakuon. Ŝi ellitiĝis, sed Floro ne moviĝas, ne svingas la voston, ne ĝemetas de plezuro, kvazaŭ parole. Al Ada subite ekmankas parto de la mondo, io ne estas en sia ĝusta loko, io estas sensenca.

Ŝi brosis siajn dentojn, lavis la vizaĝon, ŝanĝis sian veston kaj revenis en la dormoĉambron. Floro ankoraŭ kuŝis. Ada milde glitigis sian manon sur la mola felo; la korpeto iom malvarmis, la haroj ne reagis al la kareso, nenia susuro. Ŝi iris al la kuirejo, boligis akvon, kuiris kafon, sed ne trinkis ĝin. Ŝi simple sidis ĉe la kuireja tablo, ne sciante kion fari. Ŝi momente rememoris la tagon, kiam Floro unuafoje aperis antaŭ ŝiaj okuloj, ankoraŭ eta bulaĵo simila al pluŝa ludilo. Ĝin alportis eksamato, kies nomon ŝi apenaŭ memoras. De tiam, la ligiĝo fariĝis tiel intima, ke la ĝeamikoj nomis ilin Florada. Ĉu Florada fartas bone? Ĉu Florada promenis hodiaŭ? Ĉu Florada estas hejme?

Estis malvarmeta, bluĉiela dimanĉa mateno. Normale, ili devus promeni en la parko, kiel ĉiudimanĉe. Floro amis trairi ĉiam la samajn vojetojn, flari la samajn angulojn, ŝia kapeto pli alte staris, ŝi enflaris la kampan aeron kun evidenta plezuro. Ŝi ĉarme pisis ĉiam samloke, poste rigardis al sia kunulino petante aprobon; ankaŭ Ada klopodis ripeti la ĉiam saman rideton.

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Libroproduktado: kresko tro eta

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo de Esperanto* ĉiujare publikigas statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en *Hungara Vivo*. Por tiuj malmultaj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” en la revuo *Esperanto*, en kiu estas registrataj ĉiuj paperaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro. Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en “Laste Aperis” estas registrataj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktudadon kaj fideinde vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn librojn, kaj en “Laste Aperis” kutime mankas lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste Aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado tra libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj.

Sed mankas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”. Vidu la rezulton.

<b>Jaro</b>	<b>Libroj Paĝoj</b>		<b>Jaro</b>	<b>Libroj Paĝoj</b>	
1991	222	26.091	2006	204	30.078
1992	205	25.789	2007	184	31.183
1993	136	18.511	2008	158	25.381
1994	188	22.078	2009	158	24.272
1995	200	23.345	2010	204	28.232
1996	232	28.637	2011	172	19.775
1997	273	27.727	2012	153	23.144
1998	208	28.769	2013	178	25.344
1999	208	24.460	2014	107	14.024
2000	235	25.869	2015	172	25.629
2001	222	31.520	2016	189	32.323
2002	174	26.451	2017	139	23.353
2003	224	28.424	2018	127	19.483
2004	183	27.295	2019	150	28.194
2005	159	23.780	2020	78	16.906
			2021	106	16.088

Laŭ “Laste Aperis” en 2021 surmerkatigis **106 libroj** kun **16.088 paĝoj**, nur en 2020 la rezulto estis pli magra. La ĝenra distribuo (vidu la paĝosuban tabelon) montras, ke nun aperas proporcie malpli multaj lerniloj ol antaŭe. Tio estas natura, ja nun oni lernas “nian karan lingvon” rete, sed ne en kursoj kun paperaj libroj.

## Novjork’, Novjork’!

Dum 12 el la 14 lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia) de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte politikaĵojn. Sed pasintjare li kontribuis al “Laste aperis” nur per du libroj, kaj unualoke estas la Novjorka eldonejo *Mondial*, inter kies 13 eldonaĵoj estas kelkaj *Beletraj Almanakoj*, kiujn la Roterdama libroservo mendas-kaj-vendas kiel apartajn librojn.

2021. Libroj		2021. Paĝoj	
Mondial (Usono)	13	Mondial	2224
Libera (Belgio)	12	FEL	1974
FEL (Belgio)	7	Impeto	1311
Impeto (Ruslando)	7	Libera	1240
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	7	KAVA-PECH	988
Horizonto (Japanio)	6	Ars Libri (Pollando)	796
A. Cherpillod (Francio)	3	Edistudio	766
Edistudio (Italio)	3	Horizonto	604
La Blanchetiere (Francio)	3	Belmonto (Japanio)	491
MAS (Francio) kaj aliaj	2	Fonto (Brazilo)	376

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2021	1991-2021 Sume aŭ average
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	106	5.591
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	16.088	772.145
Averaĝa paĝonombro de 1 libro	120,3	145,2	155,7	151	138,1
Averaĝa prezo de 1 libro (eŭroj)	8,20	11,40	12,1	13,22	10,43
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	6	781
Originala beletro	258	214	213	25	710
Traduka beletro	458	361	330	21	1170
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	12	626
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	241	299	173	13	726
Politiko, historio, filozofio, socio	166	228	248	15	657
Scienco kaj tekniko	182	93	33	6	314
Religio	105	93	72	4	274
Aliaj temoj	172	107	50	4	333



La resuma listo por 31 jaroj preskaŭ ne ŝanĝiĝis. Antaŭ kvar jaroj MAS rompis la unualokecon de UEA en la resuma librolisto kaj de FEL en la resuma paĝolisto. Ne estas verŝajne, ke laŭ la titolkvanto MAS estos superita en la proksimaj jaroj.

<b>1991-2021. Libroj</b>		<b>1991-2021. Paĝoj</b>	
MAS	219	MAS	32.366
UEA (Nederlando)	168	Mondial	31.809
Libro-Mondo (Pollando)	162	FEL	28.390
Mondial	154	Fonto	23.844
FEL	146	Libro-Mondo	22.803
Fonto	142	UEA	21.160
Impeto	131	KAVA-PECH	20.428
KAVA-PECH	119	Impeto	20.289
Edition Iltis (Germanio)	116	Sezonoj (Ruslando)	14.586
La Blanchetiere	90	AEP (Svislando)	12.789

## **Belgio unualoke**

Sen MAS Francio cedis al Belgio sian kutiman unuan lokon en ĉi-jara tabelo. Sed Francio plu avangardas en la resuma listo por 31 jaroj.

<b>2021. Libroj</b>		<b>2021. Paĝoj</b>	
Belgio	20	Belgio	3244
Usono	15	Usono	2313
Francio	12	Ruslando	1633
Ĉeĥio	9	Pollando	1512
Japanio	9	Japanio	1279
Ruslando	8	Ĉeĥio	1148
Italio	5	Italio	1032
Pollando	5	Francio	1001
Kroatio	3	Svislando	507
Nederlando	3	Nederlando	420

<b>1991-2021. Libroj</b>		<b>1991-2021. Paĝoj</b>	
Francio	744	Francio	85.440
Germanio	465	Germanio	54.495
Pollando	385	Brazilo	54.306

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Poezia kvodlibeto

de Miguel Fernández



La hispana poeto, literatur-kritikisto, eseisto, profesoro pri literaturo kaj direktoro de la Instituto Cervantes **Luis García Montero** [Granado, Andaluzio (Hispanio), 1958] konatas en Esperantujo dank' al la poem-antologio *Poezia: armilo ŝargita per futuro*, kiun mi havis la honoron editori en 2013, en eldono de SAT en Hispanio. Li kaj lia edzino, Almudena Grandes [Madrido (Hispanio), 1960 – 2021], unu el la pintaj figuroj de la nuntempa hispana romanarto kaj de feminismo, konstituis altgrade engaĝigintan paron da verkistoj. Kaj mi parolas en paseo, ĉar, bedaŭrinde, la 27an de novembro 2021, Grandes, ve!, mortis pro kancero. Jam de 2015, kadre de la García'a poemaro titolita *Almudena*, legeblas la emociplene kortuŝa poemo dediĉita al la edzino *Foresto estas ia formo de vintro*, kiun la legantaro aparte ŝatas. Eke de la forpaso de Almudena, tiu poemo abunde kaj redunde cirkulis tra la reto kiel plej elkora adiaŭo al la admirata verkistino. Jen mia pria esperantigo de la cirkulinta versio, kiu finiĝis per vinjeto de maldekstrula pugno:

## FORESTO ESTAS IA FORMO DE VINTRO

*Same kiel la korpo de surneĝa venkito,  
ĝuste ĉe tiu vintro, kiu frostigas kantojn  
vesper-fale ĉe aŭta radioricevilo,  
samkiel telegramoj, kiel vundita voĉo,  
kiu trairas noktajn telefonojn,  
kiel lumturo iras  
tra la melankolio de surteraj boatoj,  
kiel la duboj kaj certecoj plenaj,  
kiel mia silueto ĉe fenestro,  
tiel doloras nokto  
kun la vintro de l' tempo, kiam vi al mi mankas,  
kun la neĝo farinta mian menson tutvaka,*

*ĉar ĉion mi forgesas,  
se mi devas ellerni vin memori.*

*Luis García Montero*

*Ĝisĉiame, Almudena 🍷*

**Cristina Peri Rosi** [Montevideo (Urugvajo), 1941] estas urugvaja-hispana verkistino, tradukistino kaj politika aktivulino ekzilita en Hispanujo ekde 1972. De tiam ŝi loĝas en Barcelono, kie ŝi disvolvis la plej grandan parton de sia literatura kariero. Laŭ la eldonistoj de la revuo *Confluencia*, “ŝi estas rigardata unu el la plej gravaj hispanlingvaj verkistinoj”. En 2021, ŝi ricevis la plejan literaturan honoron riceveblan en Hispanlingvio, la Premion Cervantes. De 1976 ĝis nun, ĉi premion gajnis 41 viroj kaj nur 6 virinoj, kio evidentigas la masklismon regantan en la literatura mondo. Miaflanke, mi volis fari omaĝon al tiu eminenta verkistino aperigante ĉi-revue mian tradukon de du el ŝiaj poemoj.

### **ĜUSTA DISTANCO**

*Ĉe amo kaj ĉe boksado  
ĉio estas afero de distanco.  
Se vi tro proksimiĝas tio min ekscitas  
min timigas  
min obsedas igas min diri stultaĵojn  
ektremi.  
Sed se vi foras  
mi suferas tristiĝas  
restas sendorma  
kaj verkas poemojn.  
(Otra vez Eros [Refoje Eroso], 1994)*

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

## Ne ĉiuj libroj kostas

Dostojevskij, Fjodor Miĥajloviĉ. *Kvin rakontoj* / Tradukis el la rusa Grigorij Arosev, Aleksander Korĵenkov. Kompilis Aleksander Korĵenkov; Antaŭparolo kaj notoj de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2021. — 55 p. — (Virtuala Biblioteko de Sezonoj; №19).

Ĉeĥov, Anton Pavloviĉ. *Malgranda trilogio* / Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov, Anna Pentus, Mati Pentus. Kompilis Aleksander Korĵenkov; Antaŭparolo kaj notoj de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2021. — 39 p. — (Literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, 2021).

En situacio, kiam papero malabundas, energio por produkti pli kaj pli kostas, siliko ne troviĝas, estas granda kaj plaĉa surprizo, ke eldonejo disponigas senpage kelkajn siajn verkojn, kaj sufiĉas ilin elŝuti (se entute oni havas energion por funkciigi komputilon...)


La eldonejo *Sezonoj*, mastrumata de Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka, proponas 19 librojn senpage deŝuteblajn ĉe <https://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>, estas ne malvasta elekto en pdf kaj en ePub plus malnovaj numeroj de la revuo *La Ondo de Esperanto*. Apud Dostojevskij, kies naskiĝan datrevenon ni havis en 2021, ni havas Tolstoj, Simenon, Dickens, Poe, Zamenhof, Brjusov, Lermontov, Conan Doyle, Harrison, Gogol, Ĉeĥov, Puŝkin, plus du nedikajn broŝurojn de Korĵenkov mem. De Tolstoj estas fakte inkunabloj de antaŭ pli ol cent jaroj eldonitaj de *Posrednik*.

Kelkaj eroj superas 100 paĝojn, aliaj estas kelkdekaĝaj verkoj, noveloj aŭ longaj eseoj.

Tre freŝe aldonita (2021) estas *Kvin rakontoj* de Fjodor Dostojevskij, kiun komplementas *Fjodor Dostojevskij en Esperanto*, longa eseo de Korĵenkov, aperinta en 2011. Ĉi lasta komenciĝas per la genealogio de la verkisto ekde 1389, kio montras ke lia deveno estis tataro kaj ke la nomo Dostojevskij estis akirita el la nomo de vilaĝo Dostojeva, donacita en 1506 al praulino de la verkisto. Fjodor fariĝis armea inĝeniero, sed tuj poste ekŝiĝis el la armeo kaj interesiĝis nur pri literaturo, verkante originale kaj tradukante.

Certe ĉiuj kleraj rusoj scias, sed por eksterlanda recenzisto estis novaĵo la mortkondamno de Dostojevskij pro disvastigo de malpermesita letero, kaj eĉ pli la organizo de la ekzekuta teatra ceremonio, sen la lasta akto kun la pafmortigo, anstataŭata de kvarjara bagnado kun posta devigo al armea servo kiel simpla soldato. Tia situacio ne daŭris longe, kaj nia aŭtoro denove plonĝis en literaturon eĉ devante

Fjodor Dostojevskij  
*Kvin rakontoj*



verki romanon laŭ tre tempostrikta kontrakto; familiaj okazaĵoj donis al li sugestojn por la intrigo de siaj romanoj.

La broŝuro rakontas pri la verkoj de Dostojevskij esperantigitaj ĝis tiam: *Blankaj noktoj* kaj *Krimo kaj puno*, eldonitaj ĉiuj de Sezonoj. Tradukojn faris Grigorij Arosev, Aleksej Birjulin, Aleksander Korĵenkov kaj Andrej Parfentjev, kiuj devis alfronti kelkajn problemojn, ĉar la aŭtoro estis tre selektema koncerne vortojn, kaj, kompreneble elekto de specifa termino transdonas tiun aŭ alian emocijon de familiareco.

Sed ni revenu al la kvin rakontoj, tradukitaj de Grigorij Arosev kaj Aleksander Korĵenkov.

La rakontoj estas *mi*-rakontoj, sed tuj la protagonisto ne estas la “mi” sed nova protagonisto, kiu cetere akceptas en la rakonton novan protagoniston. *Honesta ŝtelisto* aspektas teatraĵo kun du rolantoj, la eventualaj ceteruloj estas figurantoj; pereo akompanas povrulon, inter misŝanculo kaj trampo ĝis la antaŭvidebla tragika fino. Ankaŭ en *Novjara balo kaj nupto* montriĝas kiel sociaj klasoj strukturigas ankaŭ infanojn: la filino de riĉuloj ricevas riĉan donacon, la filo de malriĉa vidvino “knabo ĉirkaŭ dekjara, kun lentugoj, magra, eta, rufhara, ricevis nur libron kun noveloj, rakontantaj pri la majesteco de l' naturo, pri la kortuŝaj larmoj kaj similaj temoj, sen bildoj kaj eĉ sen vinjetoj”. Kompreneble, tiu knabeto ne havos ŝancon en la novelo: la knabino, kun kiu li sukcesis amike konversacii, kvin jarojn poste iĝis deksesjara kaj estos perforte edzinigita al matura riĉulo. En alia rakonto *Knabo ĉe Krista abio* ree estas morto de infano (ja la patrino jam mortis ĉe la unua paĝo): la atmosfero estas morna, malgraŭ iuj detaloj kiuj povas esti ĝojigaj: sed la ĝojo estas artifika, la gajaj vizaĝoj estas fikciaj.

Sed eĉ kiam la rakontanto estas trankvila kaj bonhumora, montriĝas krueleco: “Ankaŭ mi laboras: mi estis derompanta juglandan vergon por bati per ĝi ranojn”. Tion pensas la mastrobienulo de *La Kampulo Marej* (tiu rakonto troviĝis jam en la menciita eseo *Fjodor Dostojevskij en Esperanto*); la kampulo havas ĝentilan aliron al infano, sed ankaŭ tiu gesto dronas en perforta medio: politikaj arestitoj, karceruloj, ĝismorta batado, suspektata edzinmurdo.

En la fantasta rakonto *La sonĝo de ridinda homo* estas ĉio: feliĉo kaj malfeliĉo, infanoj kaj plenkreskuloj: ja ĉi tie vere protagonistas la aŭtoro, ĉirkaŭata de amaso da infanoj, steloj, sonĝoj, revoj: “sonĝoj estas tre stranga fenomeno: iu afero prezentiĝas terure klare, kun juveliste preciza poluriteco de la detaloj”, vojaĝo transtempa kaj transspaca, stelo kiu lumas kaj allogas, nova tero kiu mirigas kaj prezentas psikajn dubojn: “Ĉu sur tiu nova tero estas sufero? Sur nia tero ni povas malfalse ami nur kun sufero kaj nur per sufero! Ni ne povas ami aliamaniere, ni ne konas alian amon. Mi deziras suferojn por ami”. Kompreneble ĉio forfadiĝas ĉe revekiĝo, kiel ĉe ĉiuj fantastaĵoj, sed la leganto estas entirata en ĉi tiun atmosferon, en ĉi tiujn ĉielajn mondojn, en ĉi tiujn sociojn en kiuj li baraktas, ne sciante pri si mem, pri kio estas li mem: ĉu ridindulo de ĉiuj mokata? Ĉu suicidinto (ja makabraĵo ne povis manki...)?

Anton Ĉeĥov

*Malgranda trilogio*



Post Dostojevskij la sinbano en la rusa novelarto pluas per *Malgranda trilogio* de Anton Ĉeĥov (tradukoj de Aleksander Korĵenkov, kaj Anna kaj Mati Pentus), aperinta kiel literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto* en 2021. Rakontojn de Ĉeĥov oni legas en Rusio ŝajne jam en la malsupera mezgrada lernejo; en okcidenta Eŭropo je tiu aĝo apenaŭ estas konata lia nomo. La trilogio ĉi tie prezentata estis jam aperinta en 2004 en la kolekto *Ĉeriza ĝardeno*; ĉi nova biteldono profitas je revizio.

Ankaŭ Ĉeĥov prezentas al ni iujn strangulojn: jen persono kiu vivis ĉiam izolite, ĉiam kun ombrelo kaj galoŝoj, sed aliflanke tuta teamo volas trovi por li edzinon, klopodas al li trudi staton de li neŝatatan. Ĉeĥov ĵonglas per la vortoj por evidentigi malsamecon de personoj: “La direktoredzino prenis loĝion en la teatro, kaj ni vidis, ke en ŝia loĝio sidas Varenjka kun okulfrapa ventumilo, radianta pro feliĉo, kaj apud ŝi Belikov, malgranda, tordita, kvazaŭ oni per tenajlo eltirus lin el la hejmo”. Riĉeco, posedo de bieno estas la pilastroj de eventuala geedziĝo: amo duonokulumas nur flanke, rivaloj mezuriĝas per mondisponeblo, ne ja per amaj aspiroj. Infanoj ĉiam ĉeestas en familia vivo, sed amo malestas: familioj diseriĝas pro laboraj kaŭzoj, ranga plialtigo postulas transloĝigon kaj ja foriras nur li, ne kunportante la edzinon. Pri morto de tiu aŭ alia rolanto estas ĉiam rakontate, kvazaŭ sen funebraĵa akompano rakonto ne estus sufiĉe suka. Homoj juĝas pri la aliaj, verdiktas pri ies sorto, ofte klasata meritita, kiam ĝi estas malbona. La rusa kaj ukraina socioj ne estas prezentataj sub iliaj plej belaj aspektoj.

Ĉiuj tradukoj estas vere plaĉaj, kun tiu rusa stilo, kiu prezentas en okcidento malmulte konatajn vestojn (bekeŝoj), aŭ fruktojn (grosoj), aŭ mezurunuojn (arŝinoj). Tre rekomendindaj libretoj.

**Carlo Minnaja**

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Pri tradukado, beletraj mondoj de diversaj etnaj lingvoj kaj de Esperanto Probal Daŝgupto alparolas la legantojn en la prezento de BA. “Kiamaniere ni [redakcianoj de BA] do konverĝas al komunaj juĝoj kaj sukcesas kune ŝofori beletran revuon?” – Daŝgupto demandas sin, la redakcianojn kaj la legantojn.

Prozaj verkoj de niaj Esperantaj aŭtoroj prezentas diversajn ĝenrojn kaj tempojn.

En *Translokigo de polica arkivo* Spomenka Štimec priskribas unue, kiel Zagrebaj esperantistoj en la jaro 1946 ekhavis sian ejon ĉe la strato Amruševa 5, kiel ili perdis ĝin post la sendependiĝo de Kroatio kaj post kelkara jura proceso devis fordoni la ŝlosilojn. Certe, oni klopodis por havigi alian ejon kaj transporti ĉiujn posedaĵojn (meblojn, bibliotekon, arkivon...). Se ĝenas la vidon duoncento da arkivaj skatolegoj, kion oni faru? Jes, ordigu! Interesaj trovaĵoj sin baldaŭ prezentas. Jen bildkartoj de Ivo Lapenna, kiu donas el Londono sian opinion pri la elsendoj de Radio Zagreb. Jen skatolo el la heredaĵo de Davor Klobučar liveras unikaĵojn – dokumentojn de la sekreta polico el 1925 pri rilatoj de esperantisto kun la Soveta Ruslando.

Jesper Lykke Jacobsen priskribas katastrofon kaŭzitan de elĉerpiĝo de la naturresursoj (iam ĉ. 2040), kaj la ĝardenantan kolektivon *La Rezisto*, aro da homoj, kiuj sin savis kaj vivtenas per legomkulturado. Ĉu eble iam okazos iu rekomenco, aŭ ĉu la civilizacio simple malaperos tiel, kiel sekaj folioj forportitaj de printempa vento? – meditas la protagonisto.

Ordinara pandemia tago en la priskribo de Elisa Zanni estas proksima al tre multaj kiuj devis viziti sian oficejon dum la pandemio – kun aerumado de ejo, malinfektado de ĉiuj ne nur plataj surfacoj, skajpaj kunvenoj kaj tolerado de malbona aŭdkvalito, zorgo reveni hejmen ĝustatempe por la elimalpermeso, kaj, ĉefe, kiel organizi laboran procedon. Per telegrame kurtaj frazoj ni postsekvas tre densan tagon de la protagonistino ĝis la enlitiĝo apudedza.

Plie ĉeestas en la almanako fabelo *Alrond kaj la magia vulpo* de Evgenij Ĥvalkov, amhistorio *La ursaj feloj* de Mikaelo Bronŝtejn, vilaĝa rakonto *Berta* de István Ertl, *La Diablo*, (*preskaŭ*) certe de Sara Spanò, *Turka marŝo* de Paulo S. Viana.

Originala poezio venas de Ĵenja Amis: *Foriru, foriru, foriru...*

En la sekcio de la tradukita prozo aperas la novelo *La sinjorino en la spegulo* de Virginia Woolf (trad. el la angla Sten Johansson). Gerrit Berveling tradukis el la greka du paroladojn de Lukiano, en kiuj tiu apologias la tiranon Falariso, kaj ankaŭ Lukianan entuziasman vivpriskribon de filozofo Demonakso.

Riĉa elekto de tradukita poezio diverslingva: Benjamin Fundoianu (tradukis el la rumana Ionel Oneț), Carlos d’Abreu (el la portugala Miguel Fernández, menciendas

lia enkonduko), Boris A. Nova (el la slovena Spomenka Štimec), Dante Alighieri (Unua kanto de *Paradizo* aperas en la itala kun la tradukoj de Mauro Nervi, Enrico Dondi, Giovanni Peterlongo).

Al Dante dediĉas sian eseon Davide Astori akcentante la signifon de esperantigo de *Dia Komedio*. Distri aŭ edifi? – demandas Sten Johansson en sia artikolo pri la du plej fruaj romanistoj de Esperanto – Henri Vallienne kaj Heinrich August Luyken.

Represe aperas intervjuo de Kalle Kniivila kun la aŭstra verkisto Clemens J. Setz, plurfoja aŭtoro en BA, ricevinta en la aŭtuno 2021 la Premion Georg Büchner.

Riĉas la aŭtuna recenzo-rikolto en BA. La koncernan almanakan fakon malfermas “nerecenzo” de Jorge Camacho pri *Belarta rikolto 2020*, en kiu li prezentas laŭ la propraj vortoj “kritikan reagon kiel leganto de fasko da verkoj premiitaj [en la Belartaj Konkursoj de UEA], tamen miaopinie apenaŭ premiindaj”.

Plie Anina Stecay recenzas pri *La memoraĵoj de Julia Agripina* (de Anna Löwenstein), Jesper Lykke Jacobsen pri *La malamiko de Putin* (de Kalle Kniivilä), Jan P. Sandel pri *Palestino strangolata* (de Jorge Camacho), Hans E. Becklin pri la lerno-libro *Amikaro* (de Federico Gobbo) kaj Alberto García-Teresa pri *Semilla de arbol. Antología poética (1993-2019)* (de Miguel Fernández).

Vulkanoj estas la temo de la rubrikobildoj (skemo, litografiaĵo kaj fotoj de vulkana erupcio aŭ ties postsekvoj) kun aparte efekta kolora surkovrila foto, ĉiuj prenitaj el Vikipedio.

**Halina Gorecka**

## **Literatura Foiro, 2021, №214, 2022, №215**

Invit' al dantesko fermas la 52an kolekton de LF. La plej universala poeto karakterizis la revuon *Literatura Foiro* en 2021, kaj du eseoj pri Danto lingvisto kaj Danto politikisto, fare de Clelia Conterno respektive Carlo Minnaja, inaŭguras la decembran numeron 314, kiu tiun riĉan jarkolekton (ses numeroj po 64 paĝoj, plus eksterordinara suplemento) fermas.

Ĉu hazarde tria patrolano uverturas per delikata poemo? Nicolino Rossi estas la plej premiita el niaj vivantaj poetoj, kaj originale kaj traduke; se lirikisto en esperanto kandidatus por la literatura Nobelo, li estus la plej merita. Pri la ĉi-jara Nobel-premiito Abdulrazak Gurnah verkas Itala Vivan, kaj fragmentojn de lia prozo tradukis Bertil Nilsson.

**LITERATURA FOIRO**  
Inuitura revuo en esperanto



**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# *Mozaiko*



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

# Armeaj ŝercoj

Patrino plendas ĉe rekrutejo, ke ŝia filo estas tro malsana por esti rekrutita. Rekrutanto respondas: "Li militservos laŭe al sia sanstato" – "Sed li estas tre miopa!" – "Ne zorgu, ni metos lin tre proksime al malamiko".

Komandestro demandas rekruton, kie li dezirus pasigi sian armean servon. "Prefere kiel estro de la Ĝenerala Stabo" – "Ĉu vi estas idioto?" – "Ne. Sed ĉu tio estas nepra kondiĉo?"

Oficiro ordonas al soldatoj: "Ĉiuj prenu fosilojn kaj ekfosu tranĉeojn!" Soldato scivolas: "Sed por kio?" – "Se malamiko atakos, ni havos ŝirmejon" – "Do eble ni mem ataku la malamikon, por ke tiu okupiĝu pri fosado?"

Komandanto vicigis rekrutojn kaj kritikis ilin: "Rigardu vin mem! La haroj hirtaj, la uniformoj ĉiftitaj, la vizaĝoj nerazitaj. Se malamikoj atakos nun – kion ili pensos pri ni?!"

Kapitano de nuklea submarŝipo demandas sian viculon: "Kio okazis? Mi aŭdis iun bruon kaj sentis puŝon" – "Nia sekciestro ricevis mesaĝon ke la edzino forlasis lin kaj foriris al sia amato en Parizon". – "Domaĝe, sed kiel nia submarŝipo rilatas al Parizo?" – "Vi pravas, neniel. Kaj ne plu estas Parizo...".

Surskribo sur toamboŝtono de arma ĉevalo: "Ĉi tie kuŝas ĉevalo Rufa de la 10a regimento. Dum sia vivo ĝi piedbatis 80 soldatojn, 10 oficirojn, 2 generalojn kaj 1 minon".

Rekruto demandas la estron antaŭ elaviadiliĝo: "Kio okazos se mia paraŝuto ne malfermiĝos?" – "Vi alteriĝos la unua".

Filo de kolonelo petas vespere: "Paĉjo, mi denove deziras vidi la elefantetojn kuri!" – "Kara, la elefantetoj estas jam lacaj" – "Nu paĉjoo! Nu bonvoluuuu!" – "Bone. Taĉmento! Surmetu gasmakojn kaj kuru surplacen!"

Komandestro klarigas al rekrutoj: "Grenadon oni devas ĵeti tiel ke krom vi ĝi mortigu ankaŭ iun malamikon".

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

# Spritaj splitoj kaj preskeraroj

## *El la kolekto de reduktoro*

### *Unia forgluto*

Feliĉe EU bone kunlaboras, ankaŭ favore al la rifuĝintoj. (Manfred Westermayer, 5 marto, cirkulero al Asocio de Verduloj Esperantistaj)

### *Alten el altaro?*

Sciu, ke ĉiu oferaĵo via estos senprokraste liverita de ni laŭ via destino. (*Amerika Esperantisto*, februaro 1922, p. 13; republikigita en *Libera Folio*)

### *Silenta krio*

Antaŭ pluraj jaroj kiam estis simila pridemandado do la plej mutajn voĉojn gajnis Esperanto. (Peeter Aitai, [https://m.facebook.com/story.php?story\\_fbid=7281395185219377&id=269698093055823](https://m.facebook.com/story.php?story_fbid=7281395185219377&id=269698093055823))

### *Unue vestu vin verde*

... preparu ilin kiel spinaco (Lode Van de Velde: *Manĝeblaj sovaĝaj plantoj*, p. 12; rimarkis Ionel Oneț)

### *La senkapablĝinto*

Alseika fordonis ĉiujn siajn kapablojn por la disvastigo de Esperanto... ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Liudas\\_Alseika](https://eo.wikipedia.org/wiki/Liudas_Alseika))

### *Kongreso en necesejo?*

Deka Tutmonda Kongreso de Esperanto... 1914... pompa kunveno... Oni utiligis la plej malgrandan lokon de la trietaĝa konstruaĵo, por ke ĉi tiu kongreso restu neforgesebla. (Eric Bernard Coffinet: *La nekredebla aventuro de la misio Moresten'*, Anverpeno: FEL, 2020, p. 79)

### *Preskribo de senmoveco*

Laŭ mi, ni komitatanoj devas simple akcepti nian Statuan respondecon (groups.io/g/komitato-de-uea/message/1734; trovis Francisco Javier Moleón)

### *Ne bobela*

Multe plaĉis ankaŭ al mi bonbela historia koverilo de nia revuo Esperanto. Mi ĉiam revas esti en Esperanto Urob Herzberg. (Mian Salam Shany, [facebook.com/dmitry.shevchenko.1690/posts/10224171973105394](https://facebook.com/dmitry.shevchenko.1690/posts/10224171973105394); rimarkis Kalle Kniivilä)

Kunplukis **István Ertl**

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk).

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: [bel-abonservo@esperanto.org.br](mailto:bel-abonservo@esperanto.org.br).

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg).

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz).

**Ĉinio:** Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: [122309267@qq.com](mailto:122309267@qq.com).

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee).

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com).

**Francio:** Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: [abono@esperanto-buecher.de](mailto:abono@esperanto-buecher.de).

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com).

**Hungario:** Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: [szilvasi@eszperanto.hu](mailto:szilvasi@eszperanto.hu).

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: [feisegreteria@esperanto.it](mailto:feisegreteria@esperanto.it).

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp).

**Katalunio:** Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: [sandra@esperanto.cat](mailto:sandra@esperanto.cat).

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt).

**Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: [oficejo@esperanto.no](mailto:oficejo@esperanto.no).

**Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: [ryangomez@xtra.co.nz](mailto:ryangomez@xtra.co.nz).

**Pollando:** Bjalistoka Esperanto-Societo, Piękna 3, 15-282 Białystok. Rete: [kontakt@espero.bialystok.pl](mailto:kontakt@espero.bialystok.pl)

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: [laondodeesperanto@gmail.com](mailto:laondodeesperanto@gmail.com).

**Ĝi estas demonstra versio de la 126-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>